

# EL POPOLA ĈINIO

中國新運

12  
1997

ISSN 0032 - 4361

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA


Esperanto

KUL

V-18034/1997



Kion fari  
kontraŭ la krizo  
de akvo en Ĉinio?  
En Yining  
Taoismo en Ĉinio



Akrido kaj kapsiko

Foto de CONG XIANSHENG

## INTER NI

La jaro 1997 baldaŭ forpasos. En tiu momento ni kutime retrorigardas la iritan vojon kaj nin demandas: Kion ni faris por la legantoj, kaj kion ni faros venontjare? Ni ĉiam opinias, ke pri nia laboro, la legantoj havas plej grandan juĝpovon. Ni kontentas, ke same kiel antaŭe, en 1997 ni faris ĉion eblan por EPĈ. La eldonado de la revuo alportas al ni financan premon, tamen ni pene laboras. Ĉar ni komprenas, ke eble la Esperanto-movado devas iri zigzagan vojon, ni devas havi la kuraĝon alfronti la malfacilojn kaj tiel la movado povas antaŭeniri.

Malgraŭ la laciga vojaĝo, niaj raportistoj plenumis raportaĵojn pri la Silka Vojo en nord-okcidenta Ĉinio kaj finis la laboron en norda kaj suda Xinjiang — la fina parto de la Silka

Vojo en Ĉinio, kaj niaj legantoj legos tiujn raportaĵojn en venontjaraj numeroj.

En 1997, ni multe raportis pri la popola vivo kaj kulturo de Ĉinio. En la rubriko “Ĉinaj E-istoj” ni konigis 6 s-anojn. Artikoloj en “Temo Proponita de Legantoj” respondis demandojn, kiuj tamen estas nur eta parto el la multaj demandoj de niaj legantoj. Iuj artikoloj estas tro longaj kaj okupas multajn paĝojn, sur kiuj ni devus aperigi pli da informoj. Tion ni ŝanĝos. Ni klopodis kontentigi ĉiujn legantojn, tamen aperis en EPĈ io, kio ne plaĉas al ili. Pro tio ni pardonpetas.

Ĉe la jarfino ni deziras al ĉiuj niaj legantoj ĝojon kaj feliĉon.

La Red.

# El Popola Ĉinio

12 [471] 1997



Rokgrimpado

Foto de Yu Xiang

Rokgrimpado estas ŝatata de ĉinaj junuloj. La foto montras rokgrimpadon de studentino de la 2-a klaso de la inĝenieria fakultato de la Pekina Universitato. Ŝi estas tre diligenta en tiu sporto. Foje ŝi kune kun aliaj junuloj surgrimpis montpinton 6 000 metrojn super la marnivelo.

## EL POPOLA ĈINIO


Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fakoj de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Hou Zhiping  
Adreso: P.O.Kesto 77,  
Beijing 100037, Ĉinio  
Telefono kaj telefakso:  
+86-10-6832 1808

# ENHAŬO

- |  |  |
|--|--|
| 2 INTER NI   | 29 LAŬ LA SILKA VOJO:<br>En Yining   |
| 4 Kion fari kontraŭ la krizo de akvo en Ĉinio?   | 36 MULTNACIA ĈINIO:<br>Tri nacioj harmonie vivas en la sama vilaĝo               |
| 6 Fronte al aïdeso   | 38 TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:<br>Taoismo en Ĉinio                               |
| 8 ĈINAJ E-ISTOJ:<br>Vivo de universitata instruistino                                    | 40 Pasia amo al la ĉina lingvo   |
| 11 ESP-NOVAĴOJ   | 42 EL ĈINAJ GAZETOJ  |
| 12 Brila figuro kun verda koro   | 44 Mitoj kaj legendoj pri la Lakta Vojo  |
| 14 ORIGINALE VERKITAJJ:<br>Kvar poemoj   | 46 JUNULARO:<br>Ĝojo en rokgrimpado  |
| 15 POR KOMENCANTOJ:<br>Malespero kaj gajeco  | 48 Diversaj farunaĵoj de Shanxi-anoj   |
| 16 EKONOMIE:<br>Nova maniero, nova fizionomio;<br>"Subtera riverego";<br>Kurantaj aferoj | 51 ĈINAJ POŝTMARKOJ:<br>Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero                              |
| 20 NUNTEMPA BELARTO:<br>Pentraĵoj de du ĉinaj junuloj                                    | 2 Akrido kaj kapsiko   |
| 24 Al la nova jarcento   | <b>SUR LA DORSKOVRILLO:</b><br>[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]<br>Lacerto; Ora aŭtuno |
| 25 HOMARO KAJ NATURO:<br>Saluton, Animaĝing-monto  |  |
| 28 Antikvaj poemoj   |  |



## Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- |                         |                    |
|-------------------------|--------------------|
| 1. Taiyuan (p. 4)       | 4. Ningxia (p. 43) |
| 2. Wangjiazhai (p.18)   | 5. Nankino (p. 9)  |
| 3. Sanhe-vilaĝo (p. 36) |                    |

# Kion fari kontraŭ la krizo de akvo en Ĉin

**N**OKTOMEZE, kiam oni komencas liveri akvon, onjo Yan vokas siajn najbarojn preni akvon. Ĉar tage mankas akvo al la loĝantoj pro troa uzado de akvo en la urbo. Onjo Yan, ĉ. 60-jara, estas estrino de loĝantara komitato de pli ol 20 jaroj. Unu el ŝiaj laboroj estas voki la loĝantojn preni akvon.

Ŝi loĝas en Taiyuan, Shanxi, Ĉinio. En multaj urboj de Ĉinio mankas akvo.

Niu Maosheng, ministro de la Ministerio de Akvoutiligo de Ĉinio, diris, ke ĉ. 300 urboj de Ĉinio suferas de manko de akvo. Inter ili 108 suferas de serioza manko kaj jare mankas al ili akvo de pli ol 6 miliardoj da kubmetroj.

Jen mia intervjuo kun la ministro.

**Deng:** Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 hidraŭlika konstruado multe progresis, kial do aperis krizo de akvo?

**Niu:** Ekde 1949 ni konstruis 80 mil akvokonservejojn, kaj kontraŭinundan sistemon por la ĉefaj riveroj de Ĉinio, sed oni utiligas 18.7% de la akvo-fontoj


kaj 14% por produkti elektron. 40% de la agrikultura irigacia akvo estas uzitaj, 60% de la industria akvo estas ripetfoje uzitaj, kaj en la evoluintaj landoj la procentoj estas 70% kaj 80% respektive. Malpli ol 20% de la malpura akvo estas traktitaj en Ĉinio, dum en la

malhelpas la ekonomian kaj socialan disvolviĝon. Precipe en Tianjin (Tjanĝin), Xi'an (Ŝji'an), Taiyuan, Datong, Qingdao, Yantai, Dalian kaj aliaj urboj longtempe mankas akvo. Iuj urboj liveras akvon en difinita tempo kaj loĝantoj devas preni akvon noktomeze.

Nun la ekonomio de Ĉinio disvolviĝas rapide kaj la kvanto de bezonata akvo estas pli granda ol tiu de la liverata. En la lastaj jaroj en la ĉina kamparo ĉiujare mankis 30 miliardoj da kubmetroj da akvo, 20 milionoj da hektaroj da kampoj estis katastrofitaj de trosekeco kaj la grena produktokvanto malmultiĝis je 30 miliardoj da kilogramoj.

Laŭ amplekso kaj grado de katastrofo, trosekeco pli seriozas ol inundo. Trosekeco malhelpas ne nur la disvolviĝon de agrikulturo kaj industrio, sed ankaŭ la pliboniĝon de la popola vivo.

**Deng:** Ĉi-januare UN publikigis "Raporto de Ĝenerala Takso pri Monda Akvo-fonto". En ĝi estas skribite: "Nun 2 miliardoj da homoj en la mondo suferas de akvomanko almenaŭ



Ŝpruca irigacio vaste aplikata en kamparo

evoluintaj landoj pli ol 70%.

Ĉinio havas totalan kvanton de 2 800 miliardoj da kubmetroj da akvo kaj okupas la sesan lokon en la mondo, pokape 2.4 miloj da kubmetroj, kvarone kiom la poka-pa kvanto de la mondo, kaj per tio ĝi okupas la 109-an lokon en la mondo kaj estas unu el la 13 akvomankaj landoj.

En norda Ĉinio manko de akvo estas la plej grava faktoro, kiu



# io?

mezgrada." Ministro Niu, kiel vi opinias pri tio?

**Niu:** Mi legis la raporton. Ĝi diras, ke la krizo de akvo serioze bridos la disvolviĝon de ekonomio kaj socio en la venonta jarcento kaj eble kondukos iujn landojn al konflikto. Ĉe la fino de la 20-a jarcento ellabori strategion de akva problemo por la 21-a jarcento jam fariĝis grava temo por la diverslandaj registaroj kaj internaciaj organizoj. La akvo-fonto estas grava konsistiga parto de sintezaj fortoj de lando; ekspluatado, utiligado kaj protektado de akvo-fonto markas la nivelon de naciekonomia kaj socia disvolviĝo; serioza malekvilibro inter bezono kaj livero de akvo kaŭzos tumulton de socio kaj ekonomio.

**Deng:** Laŭ via opinio, kion ni devas fari por kontentigi la akvo-liveron de la kreskanta loĝantaro kaj disvolviĝanta socia ekonomio?

**Niu:** Laŭ mia opinio, la plej grava punkto estas intensigi la konscion de akvomanko de la tuta socio. Ĉinio estas unu el la landoj, kiuj suferas de seriozaj inundo kaj akvomanko, sekve de plimultiĝo de la loĝantaro kaj disvolviĝo de ekonomio, la tasko batali kontraŭ inundo estos pli peniga, la kontraŭdiro inter bezono kaj livero de akvo pli akros,



Finfine venis akvo soifita de loĝantoj de nordokcidenta Ĉinio!

kaj oni deziras pli bonkvalitan akvon. Tial necesas senĉese plialtigi la konscion de la popolo, la socio, precipe la diversnivelaĵoj respondeculoj pri akvomanko.

En Ĉinio inundo kaj trosekeco okazas samtempe. Laŭ longtempa vidpunkto, la plej grava problemo en Ĉinio estas manko de akvo. Kiel mildigi la kontraŭdiro inter bezono kaj livero de akvo fariĝis fokusa problemo por la tuta socio. La ministerio de akvoutiligo, kiel administra departemento, havas la politikon ĉiuflake ŝpari akvon, taŭge ekspluati akvo-fonton, plifortigi akvo-fontan protektadon kaj intensigi la administradon.

Ĉinio estas granda agrikultura lando kaj 80% de ĝia uzata akvo estas por agrikulturo. Ĝi alprenis multajn rimedojn por ŝpari agrikulturan akvon.

En industria produktado oni devas ripetfoje uzi akvon. En la venontaj 3-4 jaroj la hoteloj kaj loĝdomoj en grandaj urboj estos provizitaj per akvoŝparaj

instalaĵoj; kaj en la ĉemaraj urboj oni pli multe uzos marakvon.

Malegala dispozicio de akvo-fontoj kaj manko de hidraŭlikaj instalaĵoj kaŭzis krizon de akvo al Ĉinio. Por diri konkrete, en vintro kaj printempo malpli pluvas ol en somero kaj aŭtuno, kaj pli pluvas en suda Ĉinio ol en la norda. Por mildigi la seriozan mankon de akvo Ĉinio pretas fari transbasenajn akvoutiligajn konstruojn por ekspluati pli da akvo-fontoj. En la malsupra, meza kaj supra basenoj de Yangzi-rivero estos konstruitaj la akvokondukiloj orienta, meza kaj okcidenta por mildigi akvomankon en la provincoj Henan kaj Hebei kaj en Pekino kaj Tianjin. Nun la akvokondukilo en la malsupra baseno estas parte konstruita, tiu en la supra estas en planado kaj tiu en la meza estos ekkonstruita ĉ. la jaro 2000. Kiam la projekto estos plenumita, multe mildiĝos akvomanko en norda Ĉinio. Sed en Ĉinio nuligi mankon de akvo estos longtempa kaj malfacila tasko. ■

# Fronte al aideso

**E**N junio 1985 Ĉinio rimarkis la unuan suferanton de aideso en la lando. Tio skuis la tutan landon. Sed aideso ne ĉesis disvastiĝi pro teruro kaj malamo de popolanoj al ĝi. Ĝis la fino de 1996, 28 ĉinaj municipoj kaj provincoj trovis entute 5 990 infektitojn de virusoj de aideso, el ili 155 estis suferantoj de la malsano. Laŭ takso de fakuloj ĉ. 100-150 mil infektitoj estis ankoraŭ ne rimarkitaj.

En la unua periodo, kiam aideso atakis Ĉinion, la infektitoj plejparte estis alilandanoj kaj elmigrantaj ĉinoj, kiuj venis en grandajn ĉinajn urbojn malfermitajn kaj ĉemarajn por laboro aŭ turismo; en 1989 aperis envejna injektado de narkotaĵo en la sudokcidenta limregiono de Ĉinio, sekve de tio aperis infektitoj de virusoj de aideso; en 1995 la nombro de registritaj infektitoj kaj suferantoj de aideso atingis 1 567, duoble pli multe ol tiu en 1994; krome Ĉinio unuafoje trovis la aidesan kazon pri infektado de patrino al bebo.

Estas fakto, ke aideso minacas Ĉinion, ĉar en ĝiaj multaj najbaraj landoj sudokcidente multas suferantoj de aideso. Laŭ takso en Azio estas pli ol 5 milionoj da

infektitoj de aideso. Krome, en Ĉinio mem ekzistas iuj faktoroj, kiuj rapidigas disvastiĝon de aideso, ekz.:

Ĉinio havas ĉiujare 80-120 milionojn da migrantaj loĝantoj, kies plejparto estas junaj kaj mezaĝaj seksviglaj. Krome, Ĉinio estas troloĝata kaj en ĝi ekzistas injektado de narkotaĵo, prostituado kaj aliaj fiagoj. Ĉio tio liveras kondiĉon de disvastiĝo de aideso, ĉar aidesaj virusoj disvastiĝas plejparte dum seksumado.

Ĉinio estas evoluanta lando kun multnombraj loĝantoj kaj relative postrestinta ekonomio, do, por ĝi estas malfacila kaj urĝa la laboro bridi aideson. Komence de 1990 Ĉinio elmetis, laŭ sia situacio kaj la fundamenta politiko de la Monda San-Organizo pri mondskala preventado de aideso, siajn celon kaj nacian politikon kontraŭ aideso. Unue, oni kolektis informojn kaj materialojn pri aideso por analizi per epidemiologio ĝiajn disvastiĝon kaj tendencojn. Due, oni ellaboris rimedojn preventajn kaj bridajn kontraŭ aideso, kaj ilin prijuĝis, renovigis kaj plibonigis. Por posedi ĝustatempajn informojn pri infektitoj de aidesaj virusoj, Ĉinio stari-

gis aidesan monitorejon preskaŭ en ĉiuj siaj provincoj, pli ol 300 laboratoriojn por esplori aidesajn virusojn kaj 12 konstatajn laboratoriojn en iuj provincoj, municipoj kaj koncernaj institucioj de la Ĉina Ministerio de Publika Sano.

La ĉinaj registaro kaj prisana departementoj donas grandan atenton al kuracado kaj preventado de aideso. Ili ne nur trovis la situacion serioza kaj taskon peniga, sed ankaŭ aktive ekagis. Tamen multaj ĉinoj restas indiferentaj pri tiu afero. Tion montris la enketo farita de la Ĉina Profilaktika Akademio al pli ol 10 mil homoj en 8 urboj. 95% da enketitoj aŭdis pri aideso. Multaj el ili opiniis, ke ilin certe ne atakos aideso, se nur ili serioze sin tenas en seksa vivo. Sed aliaj tuj ektimis, parolante pri aideso, ĉar ili opiniis, ke ili estos infektitaj, se ili manpremos kun suferanto de aideso. Nur 10% sciis, kiel disvastiĝas aideso, kaj 20% ne volis, ke iliaj infanoj havu sciojn pri seksa afero, venereaj malsanoj kaj disvastiĝo de aideso. 50% ne sciis kiel sin protekti kontraŭ aideso. El tio oni povas diri, ke grave estas doni al ĉinoj sciojn pri disvastiĝo kaj preventado de aideso. Pro tio,



Esplorado de aidesaj virusoj

en la lastaj jaroj iuj grandaj urboj donis konsultiĝon pri aideso kaj tiuflankajn servojn per telefono, radio kaj televido, por ke pli multe da homoj evitu aideson. Krome, diversaj sociaj organizoj ekagis, kaj formiĝis reto de organizoj tra la lando, kiu ludas la rolon de landskala preventado kaj bridado de aideso. Samtempe Ĉinio ellaboris severajn rimedojn, ekz., malpermesi prostituadon kaj vendon de narkotaĵo; kontroli al sangoliverantoj la antikorpon kontraŭ aidesaj virusoj; limigi importadon de sango kaj produkto el sango; se oni importas el aliaj landoj sangon kaj sangajn produktaĵojn, oni devas peti, post

ekzameno, sankcion de la Ĉina Ministerio de Publika Sano.

En 1986 Ĉinio komencis esploron pri disvastiĝo de aideso en la socio, epidemiologio, diagnosta maniero, kuracado per la ĉinaj medicino kaj medikamentoj el drogherboj provfaritaj. Nun en ĝi jam formiĝis scienc-esplora vicaro. Ĉinaj sciencistoj kaj esploristoj sin okupas pri esplorado, farado kaj vasta apliko de provaĵoj, ĉar Ĉinio kun multnombraj loĝantoj bezonas grandan kvanton da preparaĵoj. Por ke suferantoj kaj infektitoj de aideso ricevu ĝustatempan kaj taŭgan kuracadon, iuj regionoj starigis klinikon, kiu respondecas pri klinikaj diagno-

zo, kuraco, flego, konsultiĝo kaj aliaj servoj al suferantoj de aideso kaj similaj malsanoj. Kvankam mankas en Ĉinio idealaj medikamentoj por kuraci aideson, tamen la ĉinaj medicino kaj drogherboj ja akiris sukceson tiukampe. En la lastaj jaroj Ĉinio faris eksperimenton pri pli ol 40 efikaj drogoj kontraŭ aidesaj virusoj simiaj kaj homaj kaj trovis, ke 5 ĉinaj drogoj evidente efikas sur aidesajn virusojn de simio. Observante sekcitajn ĉelojn per la plej avangarda laserradia mikroskopo, oni trovis, ke tradiciaj ĉinaj drogherboj povas akceli resaniĝon kaj revigliĝon de limfaj histoj detruitaj de aidesaj virusoj. ■

# Vivo de universitata instruistino

de WANG HANPING

**V**ICPROFESORINO Cui Jianhua (Cuj Ĝjan-hŭa) laboras en la Nankina Universitato jam 20 jarojn post kiam ŝi finis sian studon de la franca lingvo en la universitato. Antaŭ ne-longe ŝi estis elektita kiel ĝenerala sekretario de Jiangsu-a Esperanto-Asocio.

Ankaŭ ŝia edzo laboras en la universitato. Ilia filo, 13-jara, lernas en la dua klaso de mezlernejo. Antaŭe ilia loĝejo estis malvasta, poste ili luis duĉambran loĝejon de la universitato kaj lastjare aĉetis ĝin. En ilia hejmo ŝi akceptis multajn alilandajn esperantistojn.

Ŝia hejmo estas tre proksima al la universitato. Ĉar ŝia filo devas viziti matenan memlernadon je la sepa, tial ŝi ellitiĝas ĉiumatene je duono post la sesa por prepari matenmanĝon: kaĉon, ovon, peklitan legomon; kaj iam ankaŭ lakton, kafon, panon kaj sandviĉon.

Post foriro de la filo, ŝi kune kun sia edzo faras korpan ekzercon sur la vasta sportejo de la universitato. Ĉiumatene tie viglas multaj instruistoj kaj studentoj de la universitato. Iuj ekzercas sin per promenado aŭ kurado, aliaj per *Tajĝiĉŭan* aŭ *ĉigong*-o. Post tio ili komencas labori je la oka.

Cui Jianhua instruas la lingvojn ĉinan, francan kaj Esperanton en la fremdlingva departemento de la universitato. En la departemento laboras 80 instruistoj. Ili instruas diversajn lingvojn inkluzive de la ĉina lingvo al 20 mil studentoj. La studentoj de la kurso de la ĉina lingvo, gvidata de Cui Jian-

hua, venis de la Urba Universitato de Novjorko, Usono. Ĉiusemajne ŝi lekcias al ili la ĉinajn lingvojn kaj kulturon 5 horojn. Ŝi ankaŭ akompanas ilin viziti fabrikojn, kamparon kaj turismajn lokojn. Ĉiu-semestre al la kurso venas novaj studentoj.

Cui Jianhua estas ankaŭ vicestro de la fremdlingva departemento, tial ŝi okupiĝas ankaŭ pri administrataj aferoj: financ-aranĝo, kontakto kun aliaj lernejoj aŭ entreprenoj, varbado de studentoj por postlaboraj kursoj kaj aliaj. Kompare kun aliaj instruistoj ŝi estas pli okupata. Ofte kiam ŝi kaj la filo hejmen revenas je la 12-a, ŝia edzo jam metas la tagmanĝon sur tablo: ĝenerale bovlon da supo, pladon de legomo, pladon da fiŝo aŭ viando kaj preskaŭ ĉiam rizon.

Post tagmanĝo ŝi legas ĵurnalon kaj siestas ĝis la dua kaj duono, sed ŝia filo iras la lernejon antaŭ la unua. Du posttagmezojn ĉiusemajne ŝi instruas Esperanton, ĉ. 20 studentoj vizitas la kurson.

Je la kvina kaj duono ili finas la laboron. Post vespermanĝo ili tri kune promenas en la bela ĝardeno de la universitato. Poste Cui Jianhua helpas al sia filo en lia lernado, dume ŝia edzo lernas la anglan lingvon aŭ faras kaligrafadon. Du vesperojn ŝi instruas la francan lingvon ĉiusemajne. Antaŭ la 11-a ŝi enlitiĝas.

Matene de semajnofino ŝia filo leviĝas pli frue ol en la ordinara tago por ludi korbopilkon aŭ piedpilkon. Post matenmanĝo li faras hejmtaskon.



Cui Jianhua





Cui Jianhua (dekstre) kaj ŝiaj familianoj

Posttagmeze li sidas antaŭ la komputilo, iam ludas tubjon en sia lernejo.

Ŝia filo, 1.78 metrojn alta, estas ludema kaj optimisma. Ŝi edukas lin laŭ modelo de sia patri-no: "Estu honesta, diligenta kaj humana."

Dum la lastaj 13 jaroj, du jarojn ŝi ne vivis kune kun sia filo. En la unua fojo, ŝi lernis Espe-ranton en la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto, kiam la filo estis duonjara. La dua fojo estis antaŭ 5 jaroj, tiam ŝi studis Kebekian literaturon en Mon-

trealo de Kanado. Tie ŝi ofte partoprenis en Espe-ranta aktivado, loĝis en la hejmo de esperantisto kaj amikiĝis kun la lokaj samideanoj.

Ŝi kontentas pri sia vivo. Ŝi ŝatas la universi-tatan etoson kun junuloj kaj diversaj nacikulturoj. Ŝi sopiras plu vojaĝi eksteren por sperti la utilon de Esperanto. Nun inter-reto faciligas la komu-nikadon tra la mondo. Ŝi volas kunlabori kun ali-landaj esperantistoj je multaj flankoj: studenta in-terŝanĝo, turismo, lingva lernado ktp. Ŝi opinias, ke Esperanto ne povas rapide dis-volviĝi nur en la kadro de unu lando. ■



Cui Jianhua (meze staranta) kaj E-kursanoj de la Nankina Universitato

La telefono de Cui Jianhua:  
25-3593992 (h.)  
25-3592573(of.)  
ŝia retpoŝto: Cuijh@netra.  
nju. edu. cn au  
postdafs@nju.edu.cn.



Cui Jianhua instruas Esperanton en mezlernejo.  
Foto de WANG HANPING



Cui Jianhua kaj junaj esperantistoj de Kanado



Cui Jianhua kun esperantistoj de Montrealo

**ĈINIO**

● Shantou de Guangdong-provinco estas unu el la kvar plej frue malfermitaj specialaj ekonomiaj distriktoj de Ĉinio. En la 12-a de julio 17 e-istoj el la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kunsidis por starigi la Shantou-an E-Asocion. La provizora adreso de la prepara grupo: Wei Yida, fremdlingva fakultato, Shantou-universitato, Guangdong, CN-515063, Ĉinio. (Lin Yihua)

● Memore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Cao Jinghua (Cao Ĝinghua), fama ĉina verkisto, tradukisto kaj subtenanto de Esperanto, koncernaj organizoj de Pekino emisiis Esperantan poŝtkarton. (Qin Kaiji)

● De majo ĝis julio, la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis kvin seriojn da poŝtmarkoj "50-jara Jubileo de la Fondiĝo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio", "Raraj Birdoj", "Konstruoj de Dong-oj", "Ŝtonkaverno de Maiji-monto" kaj "Hongkong Revenas al la Patrio". La Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis memorigajn poŝtstampilojn en la ĉina lingvo kaj Esperanto en la emisiaj tagoj. La desegninto de la poŝtstampoj estas s-ro Zhang Linrui.

**FRANCIO**

● Tuluzo, la plej granda urbo post Marseille en Sud-Francio, nun posedas sian novan straton *Allee du Docteur L.L. Zamenhof, initiateur de l' Esperanto* (Avenuo de Doktoro L.L. Zamenhof, iniciatinto de Esperanto). La inaŭguro okazis la 17-an de majo, ĝin ĉeestis 60 personoj, inter kiuj troviĝis najbaroj, okcitanistoj kaj esperantistoj. La vicurbestrino prezidis la ceremonion. En ĝi prelegis pri Zamenhof s-ro Rene Centassi, ĉefredaktoro de granda gazet-agentejo, kiu aŭtoris antaŭ nelonge aperintan biografion de la iniciatinto de nia lingvo, kaj J.



La nova strato Allee du Docteur L. L. Zamenhof en Tuluzo

Paul Becvort, prezidanto de *l' Institut d' Etudis Occitans* de nia departemento. Tiu lasta esprimis vidpunkton pri simileco kaj komplementeco de luktoj por disvolviĝo de la regiona lingvo — okcitanana — kaj de la internacia lingvo Esperanto kaj komencis lerni Esperanton por prezenti al esperantista mondo dum la 83-a UK en Montpellier la lukton de okcitanistoj por viviĝi sian lingvon. Ĉeestis ĝin ankaŭ la fama tuluzo rok-kantisto. (Esperanto Kultur-Centro)

**MADAGASKARO**

● La malnova esperantisto Rabevazaha Desire, peranto de



S-ro R. Desire (staranta) instruas Esperanton en universitato.

EPĈ en Madagaskaro kaj direktoro de Internacia Esperanto-Centro, sukcesis malfermi E-kurson en beletra fakultato de iu universitato. Multaj studentoj lernis la internacian lingvon kun entuziasmo. 35 el ili sukcesis en la unua grado kaj ses ricevis la ateston pri praktika lernado. Rabevazaha Desire ankaŭ antaŭvidos E-kurson en televido, tio estos nova strategio por disvastigi Esperanton en la lando. Financa subteno estas kore petata por helpi lian agadon. Adreso: Boite Postale 3171, Antananarivo-101, Madagaskaro. (Rabevazaha Desire)

**VJETNAMIO**

● Konata Esperanto-aktivulo KREDO Nguyen Do Khanh, delegito de UEA en la urbo Ho Chiminh, pasigis (vintre 1996, printempe, somere 1997) 8 monatojn en la ĉefurbo Hanojo kaj restis 4 tagojn en la havenurbo Da Nang. Li ĉeestis klub-kunvenojn 16-foje, instruis 2 kursojn, prelegis kaj okazigis ekspozicion. Li jam donacis al la movado centon da esperantaĵoj: lerniloj, gazetoj kaj romanoj. (Nguyen Do Khanh)



# Brila figuro kun verda koro

— Memore al la 90-a datreveno  
de la naskiĝo de Tikos

**E**SPERANTO kun la nobla idealo beni la homaron pere de la movado evoluis dum pli ol cent jaroj, tamen Esperanto mem aŭ Esp-movado ne kapablis doni al la lingvo-uzantoj ajnan praktikan profiton, male, Esp-movado bezonas senegoisman oferon de siaj aktivuloj, kiuj klopodadas senlace por la afero de Zamenhof kaj ĉiuj esperantistoj, oni nomas tiujn “batalantoj por Esperanto”, en la ĉina movado troviĝas ankaŭ tiaj “batalantoj”, Tikos ja estas unu el la elstaraj esperantistoj. Kiam Tikos vivis en nia mondo, li ofte rekomendis al la komencantoj romaneton “La Verda Koro” de Julio Baghy, kiel bonan legolibron, kaj li mem ja estis tia figuro kun verda koro en la movada realo.

Tikos naskiĝis je la 21-a de decembro 1907. Kiam li lernis en mezlernejo, li konatiĝis kun Esperanto, kaj eklernis en koresponda kurso funkciigata de la Ŝanhaja Esp-Asocio. Poste li laboris en banko en la urbo Wuhan, tiam li kontaktis tieajn samideanojn kaj daŭrigis studon de Esperanto ĉe iu japana esperantisto loĝanta en Wuhan, samtempe kune kun aliaj lanĉis Esp-movadon: funkciigis Esp-kurson; fondis la Hankou-an Esp-Ligon; redaktis organon “La Lumo” (kaj poste “La Espero”), tiel komenciĝis lia dumviva serĉado kaj klopodado por la interna ideo de Esperanto. Li kaj liaj samideanoj en Esp-movado, kiu postulas la oferon kaj pagon, sinforgese klopodadis, celante plenumon de idealo pri homaranismo de Zamenhof, sed ne privatan profiton. Ili kreis felietonon “La Nova Voĉo” sur paĝoj de Wuhan-tagĵurnalo, kiu aperigis verkojn de la orienteŭropaj aŭtoroj tradukitajn el Esperanto, kaj kies honorario subvenciis eldonadon de la organo “La Espero”: akceptis fremdlandajn esperantistojn; membriĝis al UEA, SAT kaj Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE) kaj fondis filion de IPE en Wuhan. Ni povas diri, ke Esp-movado kondukis tiujn junulojn en la progresman torenton laŭ epoka postulo, tio ankaŭ estis konsekvenco de persista serĉado de esperantismo. Samtempe Tikos aktive partoprenis en la progresema kultura laboro. Pro tio, ĉefe pro lia agado por

Esperanto, li estis arestita de la tiama registaro.

Kiam la Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo komenciĝis en la 7-a de julio 1937, Tikos komencis eldoni Esperantan revuon “Voĉoj el Oriento” por informi pri la Kontraŭjapana Rezistmilito. Poste li veturis suden al Hongkong, kie li daŭrigis eldonadon de tiu revuo, kaj ĵetis sin en la nacisavan movadon. Li ne portis



Tikos donas lecionon de Esperanto.

komision de la instanco, tion ĉion li faris laŭ konscienco de simpla ĉina intelektulo kaj esperantisto, memkonscie prenis sur sin la mision kun la idealo de homaranismo kaj mondpaco, malgraŭ ke li renkontis danĝeron. Li komencis batali ne nur por Esperanto, sed ankaŭ per Esperanto.


Dum sia maljuneco Tikos jam estis fama profesia esperantisto en la lando. Li longatempe laboris en la redakcio de “El Popola Ĉinio”. Li ne volis, ke aliaj nomu lin tradukisto aŭ esperantologo, sed preferis nomi sin Esp-movadano, tiun titolon oni konvinke akceptis, ĉar ĝuste en tiu tereno li elmontris sian organizan talenton kaj grandan kuraĝon. Tuj kiam li venis en Wuhan en la juneco, li unuiĝis kun junaj samideanoj, fondis la Hankou-an Esp-Ligon kaj la Hankou-an Esp-Asociacion; en Hongkong li kunlaboris kun s-anoj Cicio Mar, Elpin, Wodan k.a. Li kunlaboris ankaŭ kun Brawn, hungara s-ano, agente de gazeto “Literatura Mondo”, kiu eldonis en Hongkong revuon “Orienta Kuriero”, por raporti la bataladon de la ĉina popolo kontraŭ la japana invado. Ili eĉ intencis eldoni “Ĉinan Antologion” kunlabore. Tikos petis s-ron Mao Dun, faman ĉinan verkiston, elekti verkojn el elstaraj noveloj kaj romanoj de la ĉinaj aŭtoroj, kaj petis s-anon S. J. Zee esperantigi poemojn de antikvaj kaj modernaj ĉinaj poetoj por la antologio. Pro malfacilo dum la milita periodo tiu antologio ne aperis, sed ili unue eldonis libron “El



Noveloj de Lusin” en Esperanto. Reveninte en Ŝanhajon, li partoprenis en tiea laboro por Esperanto. Post la liberiĝo de Ŝanhajo (1949) li kune kun s-anoj Ĵelezo, Chen Yuan, Zhang Qicheng, Honfan k.a. reorganizis la Ŝanhajan Esp-Asocion, eldonis organon “Popola Mondo” kaj funkciigis Esp-kurson en radio de Ŝanhajo.

Meze de la 60-aj jaroj okazis la kultura revolucio en Ĉinio, Esp-movado ne povis eskapi el la teroro kaj iuj rigardis Esperanton “danĝera lingvo”. Sed ekde 1972 Tikos kaŝe atentis leterojn de la enlandaj legantoj al EPĈ, notis ties adresojn kaj korespondis kun tiuj, kiuj ankaŭ kun verda koro revis plu pri Espero, eĉ instigis kelkajn verdajn Donkiĥotojn en Wuhan (Guozhu, Danko k.a.) eldoni la subteran mimeografitan gazeton “El Ĉinaj Esperantistoj” (EĈE), kiu distribuiĝis laŭ nomlisto liverita de Tikos. Tikos mem verkis artikolojn kaj fariĝis kompliko de EĈE! Tion fari dum tiu periodo estis tre danĝere. Lia kuraĝo estis neordinara, kaj li preferis oferi sin al Esp-movado.

En 1976, post la kultura revolucio, Tikos turnis rigardon al perspektiva futuro. Por revigligi la ĉinan Esp-movadon, li bakis talentulojn en Esperanto.



Tikos helpas junan esperantistinon en lernado.

Unue, li per korespondado kontaktis s-anojn en diversaj lokoj, multaj leteroj el lia loĝejo en Pekino portis Esperon al s-anoj! Poste korespondataĵoj plimultiĝis, li uzis mimeografon, tiam li jam estis 70-jara kaj malsana je hipertensio. Malgraŭ tio li organizis landskalan Tradukan Ekzercon, pruntis siajn Esperantajn librojn al legemuloj, mimeografis legolibrojn kaj esearojn (entute 21 titolojn!) kompilis lernolibron por komencantoj, akceptis

movadanojn ktp., ĉio tio aldonis novan paĝon al la historio de la ĉina Esp-movado.

Li fondis la Korespondan Esperanto-Lernejon Xinhua en la komenco de la 80-aj jaroj. Tiam neniu lernejo kreita per privata forto troviĝis en Ĉinio. Ĉinoj ankoraŭ ne emancipiĝis el la pensmaniero de la kultura revolucio, sed Tikos sukcesis per siaj talento kaj kuraĝo starigi la lernejon dum mallonga tempo. Nemalmultaj pioniroj en la ĉina Esp-movado, el kiuj iuj estas sur postenoj de gvidantoj, aliaj instruas en universitatoj, aktive subtenis lian iniciaton. Tikos aŭdace komisiis administradon de la lernejo al junulo el la urbo Guiyang kaj invitis profesiajn esperantistojn de Pekino doni instruadon. Tiel leviĝis en Ĉinio senprecedenca Esperanta febro. La nombro de anoncintoj por lerni Esperanton atingis 400 000. Poste tiu lernejo fariĝis frue velkinta floro pro iuj kaŭzoj, tamen la lernejo faris efektivan laboron, ĉar hodiaŭ inter miaj amikoj en la verda mondo troviĝas multaj lernintoj de Xinhua.

Kial Tikos, elstara Esp-movadano, povis unuigi kun s-anoj, kiuj volonte kune kun li prilaboris la verdan kampon? Laŭ mi, tio atribuas al la sorĉa

brilo de lia propra personeco. Lia senegoisma oferemo por la afero, lia kuraĝo, lia persisteco ĉiam estas por ni trezoro. La juna generacio ĉiam rigardas lin sia sekvinda mo-delo kaj memkonscie transdonas la torĉon de Espero de lia mano al posteuloj. Tikos estis ĉiam afabla, modesta kaj helpema. Li ŝajnas torĉo, kiu prilumas la vojon de verdaj vadantoj! Vintre de 1964 li varme akceptis Armand Su kaj donis al tiu juna senlaborulo instigon kaj simpatian, kaj ankaŭ mi ĝuis lian intiman akcepton kaj instigon. Ĉiuj, kiuj kontaktis lin, neniam forgesos lin. Antaŭ 61 jaroj Lusin respondis al redaktoro de “La Mondo”, ke li havas tri motivojn por aprobi Esperanton, el kiuj unu estas: “mi vidas

kelkajn esperantistojn, kiuj estas superaj al la hipokritaj egoistoj.” Ĝuste tiu generacio da ĉinaj esperantistoj, inkl. Tikos, ricevis laŭdon kaj estimon de Lusin pro sia nobla personeco. Tiu generacio kreis la bonan tradicion de la ĉina Esp-movado, kiun ni, posteuloj feliĉe heredas.

Tikos, klopodanta dumvive en Esp-movado, eterne vivas en nia movado. Lia verda koro ĉiam prilumas la vojon de verdaj vadantoj. ■



# Malespero kaj gajeco

de LIU YONG

Ĉi tie mi rakontas al vi historion pri iu kompanio.

Dum multaj jaroj post sia fondiĝo la kompanio prosperis tagon post tago, tamen, ĉi-jare ĝia profito multe reduktiĝis.

Pri tio kulpas ne la laborantoj de la kompanio, ĉar ili tiom diligente laboris, kiom en la pasintaj jaroj.

Kaj tio maltrankviligis la direktiestron de la kompanio. La jarfino alproksimiĝis. Kutime, jarfine oni aldonis minimume dumonatan kromsalajron kaj iam duobligis la sumon. Sed ĉi-jare la kompanio povos aldoni apenaŭ unumonatan kromsalajron.

“Oni ne povas imagi, kiom malesperos niaj laborantoj!” kun ĉagreno diris la direktiestro al la ĝenerala direktoro de la kompanio.

“Ŝajnas, ke oni donas bombonojn al infano,” suspiris la ĝenerala direktoro kun malgaja mieno, “antaŭe — plenmanon, sed nun — nur iomete, do ĝi certe paŭtos.”

“Jes,” la direktiestro ekvigliis, dirante: “tio rememorigis al mi, ke en mia infaneco, kiam mi elektis bombonojn en butikoj, mi ĉiufoje preferis turni min al unu sama vendisto, ĉar la aliaj metis plenmanon da bombonoj sur pesilon kaj deprenis de ili la plipezan parton peco post peco. Sed li ĉiufoje metis ne sufiĉe da bombonoj sur pesilon, kaj poste, li aldonis al ili unu pecon post alia, ĝis la celita pezo. Fakte, la de ili venditaj bombonoj pezis egale, sed mi ŝatis aĉeti ĉe tiu lasta.”

Du tagojn poste, en la kompanio cirkulis onidiro: Pro depresio la kompanio reduktos la nombron de laborantoj.

Tio skuis la kompanion. Ĉiu suspektis, ke oni maldungos lin.

Ordinaraj laborantoj pensis, ke oni unue maldungos ilin. Dume respondeculoj pensis, ke oni unue maldungos ilin, ĉar ili estas multe salajrataj.

Sed baldaŭ la ĝenerala direktoro anoncis: “Kvankam la kompanio dronis en granda embaraso, tamen ni maldungos neniun, ĉar ni preferas kune penadi por venki la malfacilojn. Sufiĉas, ke ni ne havos kromsalajron ĉe la jarfino.”

La vortoj trankviligis ĉiujn laborantojn. Kompreneble, la gajeco pri daŭra laborado jam forgesigis al ili la malesperon pri nehavo de jarfina kromsalajro.

Baldaŭ venos la Nova Jaro.

Ĉiuj pretis pasigi la Novjaron en modesteco. Subite la direktiestro kunvokis la estrojn de la departementoj.

Vidante ilin hasti al la kunsido, la subuloj denove dronis en maltrankviliĝo: “Ĉu oni ŝanĝis la decidon?”

Jes, ĝuste!

Momenton poste, la estroj revenis en sian oficejon kaj anoncis kun granda ĝojo: “Jen, ni havos jarfinan kromsalajron unumonatan! Oni donos ĝin tuj, por ke ni ĉiuj pasigu ĝojan novjaron!”

En la domo de la kompanio eksplodis gaja huraado. Eĉ la direktiestro en la tegmenta ĉambro sentis, ke la planko tremis. ■



# Nova maniero, nova fizionomio

Teksto de WANG HANPING

Fotoj de HAN HONG



En privata kokobredejo

**F**UJIAN, sudorienta provinco de Ĉinio, estas riĉa je oranĝoj. Antaŭe tieaj kamparanoj kulturis oranĝojn ĉefe por manĝi anstataŭ vendi. En la lastaj jaroj kamparano Cao Deyang turnis siajn kampojn en ĝardenon de oranĝoj. Ĉiujare li vendis 50 000 kg da oranĝoj kaj enspezis multe. Kaj li konstruis 3-etaĝan domon en 1995.

Reformado de Shaxian-gubernio, kie li loĝas, donis al li profiton. Fine de la 70-aj jaroj la praktikado de laŭkontrakta produktado aktivigis la kamparanojn. Ilia vivo pliboniĝis. Sekve de la disvolviĝo de agrikultura ekonomio, la tradicia familia produktado ne taŭgis por merkata ekonomio. Kion fari? La praktiko pruvas, ke estas necese kom-

bini agrikulturon, industrion kaj komercon.

En okcidenta Fujian multas



Konsultiĝo pri frukto-kulturado

montoj kaj riĉas arbaroj. Dum produktado de greno lokanoj alĝustigis strukturon de specoj de plantoj laŭ cirkonstancoj kaj grandigis la skalon de komerco, tio

altigis la profiton de agrikulturo kaj akcelis ties disvolviĝon. Shaxian-gubernio produktas ĉefe grenon, peklitan anason, bambuaĵon, frukton kaj fungon, kaj oni starigis nombron da produktaj bazoj kaj prilaboraj entreprenoj. En 50 vilaĝoj, ĉiu kun pli ol 66 hektaroj, oni starigis prilaboran linion de fruktoj. Nun 90% da kamparanaj familioj sin okupas pri tiuj 5 ĉefaj produktoj. Ilia produkto-valoro konsistigas 70% de la totala agrikultura produkto-valoro de la gubernio.

La reformado plifortigis la konsciojn de kamparanoj pri varo, vendo kaj konkurenco. En diversaj lokoj oni starigis fakajn asociojn kaj centrojn donantajn al kamparanoj servojn de kultura-do, prilaboro kaj vendo, kaj ili,






Sekigo de tabak-folioj

siavice, bone lernas diversajn sciojn. Ĉiu familio posedas 1-2 agrikulturajn teknikojn, kaj la scienc-teknikaj fruktoj estas rapide disvastigitaj.

Post reformado, en Shaxian-gubernio aperis multaj specialigitaj familioj kaj vilaĝoj, kiuj diligente laboras. Tio riĉigis ne nur ilin mem, sed ankaŭ najbarojn.

La najbaraj gubernioj kaj urboj, kiuj situas ankaŭ en mont-regiono, faris reformadon laŭ siaj propraj cirkonstancoj. Iu gubernio starigis la plej grandan bazon de persimonoj de Fujian-provinco. En alia gubernio 20 000 kamparanaj familioj kulturas bataton, 5 000 familioj prilaboras ĝin kaj 100 kompanioj ven-



Vilaĝa infanĝardeno

das la prilaboraĵojn. En Dongshandao kamparanoj vaste plantas asparagon sur sablotero kaj post prilaboro vendas ĝin al aliaj

lokoj de Ĉinio kaj aliaj landoj. La reformado donis bonan vivon al la kamparanoj de Fujian-provinco. ■

## Kurantaj aferoj

● La 20-an de aŭgusto 1997 la novtipa port-raketo "Longa Marŝo 3B", produktita de Ĉinio, sukcesis porti telekomunikatan sateliton al la destinita orbito por la Telekomunika-Satelita Kompanio Mabuhay de Filipinoj. La 15-an de februaro 1996, samtipa port-raketo malsukcesis en la lanĉo. En pli ol unu jaro la teknikistoj esploris kaj trovis la kaŭzon. Ĉi-foja sukceso donas al Ĉinio valoran sperton en komerca lanĉo de satelito.

● La giganta komputero-sistemo "Lakta Vojo III" estas produktita de Ĉinio. Ĝi povas operacii 13 miliardojn da fojoj sekunde. Ĝi estas 10-oble pli kapabla ol la komputero "Lakta Vojo II", dum ĝi estas tiom granda nur 6-one kiom la lasta.

● La 26-an de aŭgusto, ekfunkciis programo-rega telefonio en Puge-gubernio de Sichuan-provinco, do en ĉiu ĉina gubernio funkcias programo-rega telefonio, kaj la telefon-nombro en la telefona reto kreskis de 310 mil en

1949 kaj 4.06 milionoj en 1978 al 100 milionoj.

● En Usono estis ĵus registrita la fabrikmarko de la filmo *Lucky* produktita de Ĉinio. Samtempe, la filmo *Lucky* ricevis registro-atestilon en Aŭstrio, Belgio, Francio, Germanio kaj aliaj 11 landoj. Nun la filmo *Lucky* vendiĝas en 44 landoj kaj regionoj.

● La turisma pitoreskejo, Wuyi-montaro de Fujian-provinco, estos atingebla per fervojo ekde la jarfino. La fervojo multe helpos la turistojn.

# "Subtera riverego"

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de ZHAO XI

**L**A provinco Shanxi (Ŝanŝji) havas multe da karbo kaj produktas multe da elektro, en ambaŭ flankoj ĝi staras en la antaŭa vico en Ĉinio. Tamen al la provinco mankas akvo, kio malfaciligas la industrion, agrikulturon kaj socian vivon.

La akvoutiliga projekto — konduki akvon de la Flava Rivero de Wanjiashai (Ŭanĝjaĝaj) al aliaj lokoj de Shanxi-provinco, solvos la problemon de akvo.

Wanjiashai estas montvilaĝo en nordokcidenta Shanxi, preter kiu fluas la Flava Rivero de nordo suden. En majo de 1993 oni ekkonstruis en Wanjiashai la

akvoutiligan centron kun 90-metre alta baraĵo, elektrejo kaj akvokonservejo.

S-ro Guo, respondeculo pri la projekto, diris: "Preter Wanjiashai ĉiujare fluas 24.9 miliardoj da kubmetroj da akvo de la Flava Rivero. Kaj la projekto ĉiujare prenos 1.2 miliardojn da kubmetroj da akvo el la rivero. La baraĵo, elektrejo kaj akvokonservejo estas nur parto de la projekto. Por ni plej malfacilas la konstruado de kanaloj." Oni konstruos kanalojn ĉefan, sudan kaj nordan sume 459.9-kilometre longajn, kiuj trairos multajn montojn kaj lokojn kun komplika ge-


ologia strukturo. Por levi la akvon al 600-metre pli alta loko, oni devas konstrui kelkajn pump-staciojn kaj 209-kilometre longan tunelon ene de la montoj, pro tio oni nomas la projekton "subtera riverego".

Nun pli ol 7 000 laborantoj ĉinaj kaj alilandaj konstruas la akvoutiligan centron en Wanjiashai, la ĉefan kaj sudan kanalojn. Laŭ la plano, en 1998 la centro ekkonservos akvon kaj ekproduktos elektron. Kaj en la jaro 2001 akvo kondukigo al Taiyuan, ĉefurbo de la provinco. La tuta projekto plenumiĝos en la jaro 2003. ■



Konstruado transrivera





Konstruado de alvobrajo

de Wanjiashai



Ĉinaj konstruantoj

Foto de XUE HONGYU

**J**UĜATE laŭ la esprim-manieroj la tradiciaj ĉinaj pentraĵoj povas esti dividitaj en du specojn: delikat-liniajn kaj liber-stilajn. La unuaj alte taksas la bonordajn, delikatajn liniojn, dum la lastaj per simplaj strekoj montras la internan spiriton kaj senton de la aŭtoroj mem. Se oni juĝas la pentraĵojn laŭ la temoj, ili do povas dividi sin en tri specojn, t.e. pentraĵojn de birdoj kaj floroj, tiujn de pejzaĝoj kaj tiujn de homfiguroj. Sube mi konigos du junajn ĉinajn pentristojn, ĉiu kun siaj propraj trajtoj.

S-ro Shen Guangwei estas lerta en pentrado de birdoj kaj floroj. Li opinias, ke pentri nature estas alta leĝo de la arto. Nur la naturo povas doni veran senton kaj neelĉerpeblan artan inspiron, tial vo-

beto”, ni sentis ne silenton de la frosta regiono, sed vivĝojon, ne pikan froston, sed penetreman varmon.

Shen opinias, ke oni devas pentri nature, sed ne blinde bildigi la naturon. Lia pentraĵo “Rigardo al fiŝoj” prezentas tri paserojn, kiuj de sur krutaĵo rigardas fiŝojn naĝantajn en monta roĵo. La birdoj kaj fiŝoj ne estas versimilaj, tamen ilia absorba mieno montras la amindecon, liberecon kaj vigecon de la malgrandaj vivaĵoj en la naturo. La pentraĵo estas simpla, sed aprecinda. El ĝi oni facile imagas, kiel la pentristo staris sur monta krutaĵo, atente kaj silente pririgardis la birdojn kaj fiŝojn kaj post tio kun infana naiveco faris tiun verkon. Sur la fono de liaj pentraĵoj legiĝas ankaŭ liaj simplaj

# Pentraĵoj de du ĉinaj junuloj

de PANG NAIYING


jaĝi al famaj pitoreskejoj fariĝis nemankigebla parto de lia pentrista vivo.

Iam li vojaĝis al Sichuan-provinco kaj la Tibeta Aŭtonoma Regiono por fari pentraĵon. Tiam estis somero, sed lin multe turmentis ventego kaj malvarmego dum lia grimrado sur neĝkovritajn montojn. Survoje li hazarde vidis, ke sur iu neĝkovrita montpinto pompas palflava sovaĝa floro, kiu per sia granda vivipovo inspiris la pentriston kaj tute malaperigis la froston for de li... Tial, kiam ni apredis lian pentraĵon “Palflavaj floroj en Sichuan kaj Ti-

kaj antikvecaj kaligrafaĵoj kombinitaj en la tradicia ĉina pentrarto.

La pejzaĝaj pentraĵoj de Ĉinio disvolviĝis jam 1 600 jarojn. Kaj jam perfektigis iliaj arto kaj stilo. Multaj modernaj pentristoj penas krei ion novan. S-ro Wang Juanzhu (Ŭang Ĝjüanĝu) ja estas unu el ili. Li ne kiel multaj antikvaj pentristoj emas pentri apartajn monton kaj riveron, sed pririgardas la teron kaj esploras ĝin, kvazaŭ li estus homo de alia planedo, tiel ke li kreis serion da pentraĵoj “Origino de la universo” por prezenti la gravan





“Origino de la vivo”

de WANG JUANZHU



moviĝon de la pejzaĝoj de nia terglobo.

La pejzaĝoj en liaj pentraĵoj, kadritaj en ova-  
la formo, aludas la teron ĉe la origino de la vivo.  
Ekster la ovalo li pentris per nigra inko, kiu sim-  
bolas la kosmon. En imago dum rigardo de liaj  
pentraĵoj oni facile sentas la fortan montokrean  
movadon, lumegojn kaŭzitaĵn en la kreviĝo de la  
tero, erupcion de vulkanoj, ŝanĝiĝon de glaci-  
montoj en bluan maron... Ĝuste la konfliktoj de  
la fajro kaj akvo kreis la vivojn sur la terglobo.  
Por pliiĝi la penetrivecon de la homa vidado li

prezentas la travideblan aeron per densa nigro, la  
vivojn per smeralda verdo, la purecon de glacio  
per bluo kaj la glacian monton kaj bluan lagon  
per magma ruĝo...

Estas ja vere, ke ĉio ĉi estas nur supraĵa ŝanĝiĝo.  
Wang Juanzhu prezentas ankoraŭ la spiriton de la  
tradiciaj ĉinaj pentraĵoj, t.e. la filozofian ideon de  
Zhuangzi, kiu vivis antaŭ pli ol 2 000 jaroj: “Mi  
veturas sur nuboj, rajdas sur la suno kaj luno por  
vojaĝi malproksimen” kaj “Mi komunikiĝas sola  
kun la spirito de la ĉielo kaj tero”. ■

"Montokrea movado"  
de WANG JUANZHU



"Rigardo al fiŝoj"  
de SHEN GUANGWEI



"Palflavaj floroj en Sichuan kaj Tibeto"  
de SHEN GUANGWEI







Nacimalplimultaj kongresanoj

XIAO YU:

## Al la nova jarcento

**E**N 1997 okazis en Ĉinio du eventoj. Unu: en la 1-a de julio Ĉinio restarigis sian suverenecon super Hongkong. La alia: inter la 12-a kaj la 18-a de septembro okazis en Pekino la 15-a Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio (KPCĈ). Kiel reganta partio, KPCĈ prezentis al la kongreso sian programon por gvidi la 1.2 miliardojn da ĉinoj al la venonta jarcento. Tiu kongreso havas apartan signifon por la ĉina popolo.

La kongreso prezentis novan temon, t.e. preni la teorion de Deng Xiaoping kiel gvidan penson de KPCĈ kaj puŝi la konstruadon de socialismo kun ĉinaj karakterizaĵoj al la 21-a jarcento. En la nomo de la 14-a Centra Komitato de KPCĈ, ĝia ĝenerala sekre-

tario Jiang Zemin (Ĝjang Zeming) faris raporton dirante, ke en la moderna historio de Ĉinio okazis tri grandaj historiaj ŝanĝiĝoj, nome la Revolucio de 1911, kiu renversis la ĉinan feŭdan reĝimon; fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kun socialisma sistemo; praktikado de la politiko de reformado kaj pordomalfermo. Dume aperis tri grandaj politikaj figuroj, kiuj staris ĉe la fronto de la epoko. Ili estis Sun Yatsen, Mao Zedong kaj Deng Xiaoping. Dank' al Deng Ĉinio plene disvolviĝis kaj la nivelo de la popola vivo evidente leviĝis. La kongreso aprobis la rezolucion: starigi la teorion de Deng Xiaoping kiel gvidan penson de KPCĈ. Tio montras, ke KPCĈ persistos en reformado, pordomalfermo kaj konstruado de socialismo kun ĉinaj

karakterizaĵoj.

La kongreso emfazis, ke Ĉinio estas ankoraŭ en la prima-eta po de socialismo (etao neevoluinta) kaj sub tiu premio aranĝas laborojn por disvolvi ekonomion, politikon kaj kulturon de Ĉinio. Establi novan sistemon por vigligi la naciajn ekonomion estis unu el la fokusaj temoj de la kongreso, kiu venis al la konkludo, ke estas necese transformi multajn ŝtatajn entreprenojn en la akciajn kaj estas permesate al entreprenoj bankroti aŭ aneksi aliajn entreprenojn. Kompreneble, tio ne signifas praktiki la privatan

posedsistemon, sed serĉi novajn taŭgajn rimedojn por plibonigi la administradon de entreprenoj kaj altigi la produktivecon,

La kongreso elektis la novan Centran Komitaton konsistantan el 193 membroj, kun Jiang Zemin kiel ĝia ĝenerala sekretario. Lia reelektiĝo plifirmigas lian pozicion en la tuta partio. Aperis novaj kaj alte klerigitaj membroj de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPCĈ. Promociiĝis vicĉefministro Zhu Rongji (Ĝu Ĵongĝji), kiu respondecas pri ekonomio. Tio montras, ke la Centra Komitato de KPCĈ donas grandan atenton al la ekonomia reformado. Wei Jianxing (Ŭej Ĝjanŝing), sekretario de la Komisiono por Inspekti Disciplinon sub la Centra Komitato de KPCĈ, elektiĝis kiel membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPCĈ. Tio vidigas, ke Ĉinio intensigos la batalon kontraŭ koruptiĝo. La aliaj membroj estas Li Peng, Li Ruihuan, Hu Jintao kaj Li Lanqing. ■



# Saluton, Animaqing-monto

Teksto kaj fotoj de QING HUA

En la universitato ili estas ordinaraj studentoj, sed poste ili aliĝis al la Scienc-ekspedicia Asocio de la universitato kaj fariĝis la plej kuraĝaj homoj, ĉar ili surgrimpis la altan Animaqing-monton.

Animaqing-monto staras sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo, en sudorienta Qinghai-provinco. Maqinggangri, ĝia plej alta pinto, estas 6 282 m super la marnivelo. Ĝia geologia strukturo apartenas al kontinenta glacirivero, ĝia jara averaĝa temperaturo estas 7.7 °C sub la nulo, ĝia neĝlinio altas je 4 800 m. La monto estas grandioza, tie la klimato estas ŝanĝiĝema, kaj la lokanoj nomas ĝin dia monto sur la altebenaĵo. Ĝi allogas multajn montgrimpistojn en- kaj eksterlandajn.


La membroj de la ekspedicio "Pli Forta ol Ŝarko"

de Qinghua-universitato venis el 7 fakoj: arkitekturo, elektroniko, aŭtomacio ktp. Ili ne nur amasian fakon, sed ankaŭ la naturon. El la 12 membroj la plej aĝa estas 25-jara kaj la plej juna malpli-ol-20-jara, kaj inter ili estas du studentinoj.

Frumatene de la 2-a de aŭg. 1996, akompanate de leviĝanta suno, ili ekgrimpis de la kampadejo sur neĝlinio en alto de 5 600 m. Kontraŭ muĝanta vento Wang Jingliang, Zhu Jianhan kaj Li Heng venkis diversajn malfacilojn dum irado kaj finfine atingis Maqinggangri je 17 minutoj post la 13-a. Tiam sub la suno, nuboj kaj blua ĉielo, glacirivero, neĝo kaj rokoj fariĝis tre belaj, kaj la konkerintoj sentis ke la naturo estas tre sankta kaj granda. Starante sur la montpinto, ili laŭte kriis: "Saluton, Animaqing-monto!"

Ripozo





“Tiu linio estas plej taŭga.”



Grimpado

# INDEKSO DE EPĈ 1997

	Nr.pĝ.		Nr.pĝ.
<b>POLITIKO</b>			
Gazetara konferenco sen angla-lingva interpretado	1.28	Mem pagi por sia lernado en alternejo	10.46
Guangdong: renkonte al tiu tago	2.39	Ĉinaj superhomoj	2.28
Mia unua impresoj pri Hongkong	4.35	Protekti niajn kunulojn	8.28
La ĉina popolo dankas lin	5.4	En la Ĉina Scienc-Teknika Muzeo	10.50
Informoj pri Hongkong (I)	5.24	<b>ĈINA KULTURO</b>	
Informoj pri Hongkong (II)	6.28	Anekdotoj pri bovo	1.46
"Unu lando, du sistemoj" en Hongkong	7.4	Ĉinaj mitoj pri di(in)oj de la amo	3.42
Leĝoj en Ĉinio	7.48	Primitiva terkultivado per fajro kaj tranĉilo	5.36
Informoj pri Hongkong (III)	10.7	Proverboj en la ĉina lingvo	7.36
Al la nova jarcento	12.24	Ceremonio kaj moro pri teo	9.42
<b>EKONOMIO</b>			
Kial malmultiĝis pasaĝeroj de trajno?	1.24	Antikva piedpilko	11.48
Ĉinio — la kvina turisma lando	1.25	<b>SPORTO KAJ HIGIENO</b>	
Ŝanĝiĝo de Yunxi-gubernio	2.42	Oficinala uzado de ruĝaj formikoj	1.49
Changchun-a ekonomia ekspluata distrikto	2.42	Kie oni faras sportojn?	1.40
La Hidraŭlika Projekto Xiaolangdi de la		Agrabla ĝuo de paraŝuta glisado	3.46
Flava Rivero	3.16	Rakontoj pri la Ĉina Virina Piedpilka Teamo	4.24
Perspektivo de la petrola industrio en Ĉinio	4.37	Defie al altaj montpintoj de la mondo	6.36
Ekologia agrikulturo sur alkalaj kampoj	4.38	Diligentaj ekzercantoj de tajĝjiĉuan	7.50
Post liberiĝo el pezaj ŝarĝoj	5.47	Senfina kurejo	8.24
Fusong — ginsenga gubernio	5.48	Ĉina uŝuo tutmonde	9.49
La unua jaro de la Naŭa Kvin-jara Plano de Ĉinio	6.38	Lang Ping revenis	10.20
Por loĝigi en novaj domoj	7.16	Ĉina juniga rimedo	3.47
Utiligo de nuklea energio	7.16	Suĉigu al la beboj patrinan lakton	6.48
Kiel Pekino traktas rubon?	8.36	Gajaj kanceruloj	8.45
La Nanning-Kunming-a Fervojo	9.6	Avineto de infano-leŭkemiuloj	9.48
Projekto de la Tri Gorĝoj	10.4	Fronte al aids	12.6
Ĝi liberigis sin el embaraso!	10.6	<b>POR VIA SANO</b>	
Internacia flughaveno de Pekino en pligrandigo	11.4	20 sanigaj ekzercoj (I)	1.48
Pri Guizhou	11.4	20 sanigaj ekzercoj (II)	3.49
Oni kune ĝuas feliĉan vivon	11.5	20 sanigaj ekzercoj (III)	5.49
"Subtera rivero"	12.18	20 sanigaj ekzercoj (IV)	7.47
Nova maniero, nova fizionomio	12.16	20 sanigaj ekzercoj (V)	9.50
Kurantaj aferoj	1-12	Sanprotekta gimnastiko	11.50
<b>KULTURO, EDUKO, SCIENCO</b>			
<b>KAJ TEKNIKO</b>			
Vilaĝa instruisto Wang Haoren	2.38	<b>LITERATURO KAJ ARTO</b>	
Novgeneraciaj reĝisoroj de ĉinaj filmoj	5.38	La azeno de Afanti (Humuraj versaĵoj)	1.43
Universitato investita de entreprenisto	7.28	Sunsubiro ĉe bovlobakujo (Novelo)	4.46
Kaligrafo Tian Yuxin	8.50	Aĉeti propran vinon: Fari ĉapon	
		(Antikvaj humuraĵoj)	6.43
		Klasikaj poemoj	8.44
		Virino en mamnutrado (Novelo)	10.39
		Disputi pri la suno: Kapti grandegan fiŝon	

	Nr.pĝ.		Nr.pĝ.
(Antikvaj fabloj)	11.15	"Elhaŭtiĝu, krokodiloj!"	1.7
Digo de Ru-rivero; Kampe antilopo falas;		Renkontiĝo en vespero	3.4
Ĉasisto; Steletoj (Antikvaj poemoj)	12.28	Amantoj de ĵipo	4.40
NUNTEMPA BELARTO		La Ĉina Junulara Tago	5.16
Pentrado ne sur papero nek per peniko	3.21	Li penas por lernado kaj vivtenado	7.6
Ĉiu floro estas bela	6.25	Por bona okupo	8.40
"Animo de lako" kaj "Spirito de pentraĵo"	9.21	"Morgaŭ mi fariĝos novedzino"	9.16
Pentraĵoj de du ĉinaj junuloj	12.20	El mia taglibro	11.6
<b>SOCIA VIVO</b>		Ĝojo en rokgrimpado	12.46
Ĝojo en filatelo	1.42	<b>NACIOJ KAJ RELIGIOJ</b>	
Vivo de ĉinaj emeritoj	2.6	Tibeta ŝtonskulpturo elspiranta religiecon	1.17
Tri virinoj nomataj Maria	3.6	Kantoj sur stepo	3.24
Mastrino de urbeto	3.20	La lastaj karavanoj	5.45
Matenmanĝo en Guangdong	3.28	Riĉa rikolto en dezerto	6.49
En loĝkvartalo de Tianĵin	4.4	Niuĵie, huj-a kvartalo en Pekino	7.46
Fervoraj volontuloj	4.6	En Lhasa ne mankas freŝaj legomoj	9.28
Universitato de kamparanoj	8.4	Antikvaj libroj en rapida reordigo	9.40
Instruistoj en infanĝardenoj	9.46	Pri la tibeta medicino	11.46
Amoplana "familio"	10.44	<b>MULTNACIA ĈINIO</b>	
Bufedejoj en Pekino	10.28	Oroĉen-oj adiaŭis ĉas-pafilojn	2.48
Kiam ili plenkreskas...	11.40	Kulto al la bambuo	4.44
Moroj pri terno	11.28	50 jaroj de aŭtonomeco en Interna Mongolio	6.4
Diversaj farunaĵoj de Shanxi-anoj	12.48	Revizito al paŝtejo en Qinghai	8.38
<b>FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO</b>		Islamanoj en Xishuangbanna	10.36
De kiu dependas ĉinaj maljunuloj?	2.4	Tri nacioj harmonie vivas en la sama vilaĝo	12.36
Pri "familia investo" de ĉinoj	5.42	<b>VOJAĜO KAJ VIDINDAJ LOKOJ</b>	
Rikoltistoj de tritiko	8.42	Belega vojaĝo en Ĉinio	2.41
Nova problemo por Ĉinio — senlaboreco kaj reenoficiĝo		Naskiĝloko de Li Bai	5.28
<b>ORDINARAJ ĈINOJ</b>		Akvoŝaloj en Huangguoshu	5.21
Urbaj beligistoj	1.44	Turismo en Hongkong	8.47
Pekina tetrinkejo kaj ĝia mastro	3.44	Idilia loko de nacimalplimulto	10.24
Bonzinoj en Qiming-templo	7.40	Mondo de ŝtonkavernoj	11.24
Vilaĝa fotisto	9.44	<b>LAŬ LA SILKA VOJO</b>	
Karboministoj	11.42	Hejmloko de ĉielaj ĉevaloj	1.29
<b>HOMARO KAJ NATURO</b>		Ĉe Qilian-montaro	2.29
Changbai-montaro	2.25	Antikva urbo Juyan	3.29
Oazo en dezerto	4.25	Jiayuguan-pasejo — la fino de la Granda Muro	4.28
Naturparko de ruĝvertaj gruoj	6.21	Fascinanta Dunhuang (I)	5.29
Sur la Leŭsa Altebenaĵo	8.21	Fascinanta Dunhuang (II)	6.29
Flosado sur Mengdong-rivero	10.21	Plej okcidentaj pasejoj	7.29
Saluton, Animaqing-monto	12.25	Xinjiang kaj la Silka Vojo	8.29
<b>JUNULARO</b>		Vento en Dabancheng	9.29
Ni, gejunuloj de EPĈ-redakcio	1.4	Ĉarmaj paŝtejoj ĉe Tianshan-montaro	10.29
		Ĉe Sayram-lago	11.29



	Nr.pĝ.		Nr.pĝ.
En Yining	12.29	<b>ĈINAJ E-ISTOJ</b>	
<b>HISTORIAJ RESTAĴOJ</b>		Wei Yuanshu sin dediĉanta al E-instruado	2.8
<b>KAJ ARKEOLOGIO</b>		Ŝadman kaj Ĝazira	4.11
Akupunkturo kaj kupra homo	2.45	Li volonte servas kiel pavimero	6.9
Kie aperis la unua birdo?	2.36	Huang Nai penadas en mallumo	8.8
La Ŝanhaja Muzeo abunda je valoraj historiaj objektoj	6.17	Lokomotivisto Zhang Qingnian	10.9
Bambuaj slipoj — libro antaŭ 2 000 jaroj	6.40	Vivo de universitata instruistino	12.8
Unuaj loĝantoj de Pekino	7.20	<b>ORIGINALE VERKITAĴ</b>	
<b>INTERNACIAJ AFEROJ KAJ AMIKAJ KONTAKTOJ</b>		Maldungo; Otto, finna senlaborulo	1.11
Ĉinaj kuracistoj en aliaj landoj	1.36	Poemoj el Vjetnamio	2.12
Alilanda florkulturisto en Ŝanhajo	2.44	Panjo; La granda draŝmaŝino	3.12
Kroataj amikoj kun elesperantigita libro kiel donaco	3.9	El nebulo de miaj rememoroj; La neatendita	4.14
Brito en suda Ĉinio	4.48	Poemoj	5.10
Lumo por blinduloj	6.46	La ŝlosilo	6.12
Profunda sento de germanaj geedzoj	7.24	Poemoj	7.12
Terglobaj riĉfontoj kaj kontinuigebla disvolviĝo	7.38	Karmo	8.12
Pasia amo al la ĉina lingvo	12.40	Poemoj	9.36
<b>ESPERANTO</b>		Kantoj el Usono	10.8
Prospektivo al la nova internacia lingva ordo	1.8	Tata kaj Mama	11.12
Interesa renkontiĝo de esperantistaj familioj	1.10	Kvar poemoj	12.14
Postskribo de la sepa volumo de "Kolekto de Tradukoj de Bakin"	2.14	<b>POR KOMENCANTOJ</b>	
Flugu plu, Cseh-instruisto!	3.10	Edifo de blindulo	1.14
Ada — senlaca semanto en Esperantujo	3.8	Kuraĝa ŝafo (Rusa fabelo); La maljuna Polkano	2.24
Bela juna bovisto	4.8	Tri vortoj de najtingalo	3.15
Mia vivo	5.12	Lerni parolon	4.16
Intervjuo kun s-ro Francisco L.Veuthey	5.8	Rakonto pri fest-torto	5.15
Kiel korekte prononci en Esperanto?	6.14	Kiom forta estas la vivo?	6.24
Arta urbo Adelajdo	6.8	Mia franca amiko	7.13
E-instruado en la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato	6.7	Ĉevalino fine mamnutras sian idon	8.15
Interparolo kun Istvan Ertl pri E-gazetoj	7.10	Eksterordinara hundeto; Fidela al domo	9.20
Ŝovinismo aŭ internaciismo	8.6	Por kio diligente lernas la edzino?	10.15
De "fare de" al "far"	9.11	Maljuna bovo	11.11
Proverboj pri infanoj	9.14	Malespero kaj gajeco	12.15
Andrea ne plu diras "ti-ta"	10.16	<b>SUR NIA LIBROBRETO</b>	
Pri ses volumoj de "Elektitaj Verkoj de Vasilij Eroŝenko	11.13	Du poemaroj en Esperanto kaj nacia lingvo	2.16
Kongreso cele al la 21-a jarcento	11.16	Verkoj de muzikistoj-esperantistoj; Interesa	
Brila figuro kun verda koro	12.12	Esperanta lernolibro	5.20
Mitoj kaj legendoj pri la Lakta Vojo	12.44	Moralo kaj amuzo per muzo	7.15
		<b>ESP-NOVAĴOJ</b>	1-12
		<b>ALIAJ ASPEKTOJ</b>	
		Ĉu sismo prognozeblas?	9.4
		Rubo kaj bruo utiligeblaj	10.38
		Krizo de akvo en Ĉinio kaj kontraŭrimedo	12.4
		<b>EN ĈINAJ URBETOJ</b>	

En ŝtona mondo	1.21	<b>FOTOJ</b>	
En urbeto de toŭfuoj	3.25	En vintro	1.2
Gajaj drak- kaj leon-dancoj de kamparanoj	5.25	Ponto super strato	2.2
Fiŝistoj ĉe Erhai-lago	7.21	Mevoj	3.2
"Strato de alilandanoj"	9.24	Helikoj	4.2
En ponto-urbeto	11.21	Lotusfloro	5.2
<b>TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ</b>		Flugado	6.2
La dua familio de ŝuistoj	1.15	Ĉe sunsubiro	7.2
Budhismo radikas en Tibeto	2.17	Umefloro	8.2
Iom pri kajto	3.36	Mateno	9.2
Kursoj de ĉinaj mezlernejoj	4.20	Peonio	10.2
Filatelo en Ĉinio	6.41	Turo en vespera krepusko	11.2
Pri orkideoj	8.16	Akrido kaj kapsiko	12.2
Kiel trakti krimadon de adoleskantoj	10.48	<b>ĈINAJ METIARTAĴOJ</b>	
Pri ĉina kaligrafio	11.36	Telero kun salikokaj reliefoj	1.51
Taoismo en Ĉinio	12.38	Filigrana feniksa horloĝo	3.51
<b>EL ĈINAJ GAZETOJ</b>	1-12	Klozonea kruĉo	7.51
<b>INTER NI</b>	1-12	Chang'e flugas al la luno	9.51
<b>BILDOSERIOJ</b>		Konka skulptaĵo	11.51
Ĉinio en la okuloj de eksterlandanoj	1.38	<b>ĈINAJ POŜTMARKOJ</b>	
Chen Baolong kaj liaj kalabasaj skulptaĵoj	2.22	Ĉe la Akvorando	2.51
Skulptaĵoj en Pekino	3.38	Raraj animaloj	4.51
En urbeto de anasoj	4.22	Taihu-lago	6.51
En antikvaĵaj bazaroj de Pekino	4.17	Wulingyuan	8.51
Alilanda burleskulo de Sichuan-opero	5.18	Tri Regnoj	10.51
Tibeta edukado en disvolviĝo	7.18	Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero	12.51
Bonnie Seyfer kaj pekinaj stratetoj	7.44	<b>SUR LA DORSKOVRILO</b>	
En vilaĝo de vaks-tinkturaĵoj	8.25	[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]	
La templa urbo Hohhot	9.18	En la kamparo de Smolando, Svedio;	
Historia momento por Ĉinio	10.17	Mueliloj de Nederlando	1.52
Skulptaĵo el taksusa ligno	11.38	Paraŝutado; Vintra pejzaĝo	2.52
<b>SUR LA KOVRILO</b>		Akvofalo en Iguacu, Brazilo; Valo Trolupe	3.52
Gejunuloj de EPĈ-redakcio	1	Vintro en Alaska; En Rottneros-parko, Svedio	4.52
En maljunulejo	2	Ĉe boat-kaja strato de Venecio; Parko en	
Stevardinoj	3	San-Diego de Usono	5.52
Taklimakan	4	La Placo de Herooj en Budapeŝto; Bieno	
Deng Xiaoping kaj kamparanino	5	en Skanio, suda Svedio	6.52
En novtipa jurto	6	Sunleviĝo; Ĉe Össjöasjön-lago	7.52
Hongkong	7	Näsijärvi-lago de Finnlando; Boatejo ĉe lago	8.52
Bredistino kaj lemuroj	8	Nebridebla printempo en Danio;	
La Nanning-Kunming-a Fervojo	9	Czestochowa en printempo	9.52
Gaja festado	10	Flora ekspozicio en Nederlando; Kaskado	10.52
Renkontiĝo en Aŭstralio	11	Baobaboj en Madagaskaro; En aŭtuno	11.52
Rokgrimpado	12	Lacerto; Ora aŭtuno	12.52



Sur la supro de la monto.



Reordigo antaŭ la iri.



# ANTIKAJ POEMOJ

## Digo de Ru-rivero

Edzino konsolas per la poemo sian edzon, kiu laboras sur posteno malalta en la Okcidenta Zhou-dinastio (1066-771 a.K.) kaj fuĝas hejmen pro la terura diktaturo.

*Mi laŭ digo paŝas vage,  
kaj kolektas branĉojn hake.  
L' edzon longe mi ne vidas,  
kvazaŭ en malsat' insidas.*

*Mi laŭ digo paŝas vage,  
kaj kolektas vergojn hake.  
Nun la edzon mi jam vidas,  
li fidele ne forglitas.*

*Ruĝas pate vost' de bramo,  
regteruro ŝajnas flamo.  
Ni, spite ke flamas rego,  
lasu l' gepatrojn en flego.*

## Kampe antilopo falas

Juna ĉasisto trafas ĉasaĵojn, renkontante knabinon, kaj gajnas ŝian amon.

*Kampe falas antilopo  
sur blankherboj sen rezisto.  
Junulinon kun am-volo  
amindumas la ĉasisto.*

*Lerte hakas ŝi arbedojn,  
cerv' de li trafita falas.  
Li per herboj ligas predojn,  
kaj ŝi jaspmuare belas.*

*"Lante, lante!" diras kvere  
ŝi, "leĝere, ho, leĝere!  
Via fuŝpalpo ne glitu,  
Jelpi hundon ne incitu!"*

## Ĉasisto

La kanto temas pri lerta ĉasisto.

*Abunde fragmitoj pavas.  
Kvin aprojn li sage trafas.  
Ho, vi, kuraĝa ĉasisto!*

*Abunde erikoj pavas.  
Kvin apridojn li sagpafas.  
Ho, vi, kuraĝa ĉasisto!*

## Steletoj

Malalt-ranga oficisto oficveturas dum nokto, plendante pri sia sorto.

*Etaj steloj helscintilas  
tri aŭ kvin en oriento.  
Haste mi dum nokto iras  
por regnservo laŭ regento.  
Ho, ne samas la fataloj!*

*Etaj steloj flagre brilas  
ĉe Altajro kaj Plejado.  
Haste mi dum nokto iras  
kun littuko sen rajdado.  
Diferencas, ho, fatalo!*

Esperantigitaj de **Shi Chengtai**  
el *Libro de Poezio*



# En Yining

Teksto de SUN AIJUN

Fotoj de LIU SIGONG

**Ĝ**UINTE la belan pejzaĝon de Saylam-lago, mi veturis suden al Ili-rivero. Ambaŭflanke de la rivero verdas senlimaj stepoj, densas piceoj kaj frukt-arboj, dank' al la klimato varmeta kaj humida. Atinginte la lokon, mi tuj forgesis Gobion ĵus trairitan kaj sentis min kvazaŭ en agrabla akvolando sude de Yangzi-rivero. Ĉe la rivero kuŝas Yining, la plej granda malfermita urbo ĉe landlimo en nordokcidenta Ĉinio kaj plej grava komerca urbo ĉe la norda branĉo de la Silka Vojo.

## IMPRESO PRI YINING

Yining estas la ĉefurbo de la Ili-a Kazaha Aŭtonoma Subregiono, Xinjiang. Mi venis en la urbon en aŭtuna vespero. Kiam mi iris el la aŭto, tuj min allogis fruktubudoj starantaj laŭlonge de la vojo. Sub lampoj brilis kaj aromis diversaj fruktoj. Sen demeti mian dorsosakon mi alkuris al budo kaj kun bona apetito manĝis pecon da akvomelono abunda je dolĉa suko.

En la sekvanta mateno mi promenis sur strato de Yining, laŭ ĝia longo staris salikoj kaj en ĝia mezo etendiĝis zono 3 m larĝa el herboj kaj floroj. La etaĝdomoj ĉirkaŭ la promenejo, kvankam ne altaj, estis luksaj kaj modernaj.

La knabinoj pasantaj preter mi sin beligis kaj vestis laŭmode. Mi vizitis straton de frandaĵoj. Tie estis diversaj manĝejoj en loka gusto etendiĝantaj 200 m. Intere estis, ke iliaj mastroj vokis jen en la ujugura lingvo, jen en la kazaĥa, jen en la hana. Poste mi informiĝis, ke en Yining troviĝas ankaŭ stratoj de vestoj, fruktoj k.a., ĉiuj kun naciaj koloroj, ĉar en Yining vivas 300 mil loĝantoj de la ujugura, hana, kazaĥa kaj aliaj 29 nacioj.


Vespere mi vizitis Ili-riveron fluantan preter la urbo. Starante sur ponto, mi vidis, ke la rivero,



kiu fluas okcidenten al Kazaĥstano, trembrilas en la suno subiranta. Mi sidiĝis en manĝejo inter betuloj ĉe la rivero. Petinte ŝafaĵojn rostitajn sur 2 pikaj stangoj kaj kruĉon da teo, mi ĝuis kantojn kaj muzikaĵojn de gejunuloj en najbaraj sidlokoj akompanatajn de murmurado de la rivero. Tiam Yining ŝajnis al mi pli ĉarma.

## HEJMLOKO DE ARKPAFIŜTOJ

Sude de Ili-rivero loĝas ŝibeoj, kiuj tien transloĝiĝis el nordorienta Ĉinio antaŭ 200 jaroj. Ili

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO







1. La fervoja stacio de Alataw Shankou
2. Staplejo
3. En foiro
4. Kazahstana komercistino
5. Landlima pasejo









Ŝnurnodoj faritaj por noti la historion de la familio

kredas je ŝamanismo kaj lamaismo. Ili vivas ĉefe de terkulturado kaj lertas en rajdado kaj arkpaŝado. Tial tiu tero ĝuas la renomon Hejmloko de Arkpaŝistoj.


Ŝibeoj estas posteuloj de la antikvaj ŝjanbejoj. Antaŭ la 17a jc. ŝibeoj viglis ĉefe en la Granda kaj Malgranda Xing'an-montaroj kaj sur la stepo Hulun Boir en nordorienta Ĉinio. Tiam, ili vivis ĉefe de fiŝado per boato, bastono, lanco, fiŝreto, pafarko kaj sagoj. Meze de la 18-a jc mil ŝibeaj soldatoj estis senditaj al Ili, Xinĵiang, por garnizonado. Do, tiuj soldatoj kaj iliaj familianoj, en-

tute pli ol 3 mil personoj, veturis per duradaj ĉaroj tirataj de bovoj al okcidento. Post du jaroj ili finfine atingis la cellokon. Tie ili fosis Qapqal-kanalon pli ol 80 km longan de oriente okcidenten, elkondukis akvon el Ili-rivero por irigacio kaj transformis dezertan teron kun areo de ĉ. 5 mil hektaroj en fekundajn kampojn. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, tie estis starigita la Ŝibeaj Aŭtonoma Gubernio Qapqal, kaj la ŝibeaj nacioj fariĝis unu el la 32 nacioj de la Ili-a Kazaĥa Aŭtonoma Subregiono. Memore al la transloĝiĝo de ŝibeoj, oni difinis

la 18-an de aprilo kiel ilian festotagon de transloĝiĝo al okcidento.

Mi vizitis ŝibeajn familiojn. En ties korto pura kaj vasta estis sekiĝintaj ruĝaj kapsikoj. La 74-jara mastrino en blua robo kaj broditaj ŝuoj afable invitis min en la domon. Sur la ŝprosoj de la dormoĉambroj, ŝrankoj kaj aliaj mebloj estas belaj gravuraĵoj kaj sur la fenestro-vitroj — buntaj papertondaĵoj. En la flanko ĉambro, kies duonon okupas terlito, pendas lulilo. Evidente, ŝibeoj ankoraŭ konservas la tradician vivkutimon de nordorientaj ĉinoj.





Festo oni sternis ĝin kaj okazigis kultan ceremonion: ĉiuj devis bruligi incensojn kaj klinsalutis ĝin por peti sekurecon de la tuta familio. Sur *Xilimama* la familio de la 82-jara Wuzhala Kexinbao notis sian historion de 7 generacioj. Li jam faris 15 nodojn sur ĝi.

Kiel ĉasista nacio, la ŝibeoj transdonis la tradicion de rajdado kaj arkpafado de generacio al generacio. Antaŭe, dum la festotago de okcidenten-transloĝiĝo kaj morta sezono de kamplaboro, ili okazigis konkurson de arkpafado. Tiuj, kiuj gajnis la unuajn tri lokojn, estis honoritaj kiel magiaj arkpafistoj. Nun, en la aŭtonoma gubernio estas arkpafaj teamoj profesia kaj amatora. Ŝibeaj arkpafistoj plurfoje gajnis la ĉampionecon en tutlandaj konkursoj kaj partoprenis internaciajn konkursojn. Pro sia lerteco en arkpafado ŝibeoj pli kaj pli famiĝis tra la mondo. Ĉinaj kaj alilandaj turistoj vojaĝantaj en Yining plejparte vizitis la Ŝibeon Aŭtonoman Gubernion kaj provis arkpafadon kun granda intereso.

## PROSPERA KOMERCADO ĈE LANDLIMO

En Xinjiang funkciis doganoj

historie. En la lastaj jaroj rapide disvolviĝis la komercado de Xinjiang kun aliaj landoj. El la 15 doganoj de Xinjiang, Korgas estas la plej granda kaj Alataw Shankou — la plej fama pro tio, ke ĝi staras meze de la Dua Eŭrazia Ŝoseo.

La dogano Korgas distancas de Yining je 90 km. kaj de Alma-Ata, ĉefurbo de Kazahstano, je 378 km. Korgas, kun 15 mil loĝantoj, areo ne vaste. En la dinastioj Sui kaj Tang (581-907) ĝi funkciis kiel grava postiljona stacio ĉe la norda branĉo de la Silka Vojo kaj en aliaj periodoj ĝi servis kiel pasejo al landoj de centra kaj okcidenta Azio por interŝanĝoj ekonomia kaj kultura. Mi veturis per aŭtobuso de Yining al la dogano. Tie mi vidis homojn kun grandaj pakaĵoj eniri en la foiron proksime de la dogano. La foirejo konsistas el 8 budoj por ĉiutagaj necesajoj, manĝaĵoj, vestoj, ĉapoj, ŝuoj k.a. La homoj venis por komercado. Atinginte la lokon, ili tuj demetis siajn varojn, ĉar ili devis fini la preparan laboron antaŭ la malfermiĝo de la dogano je la 10-a kaj duono kaj poste akcepti klientojn el Kazahstano.

Pro lingvobaro oni uzis elektronikajn kalkulilojn por montri

## Ŝibeaj familio

Interesas, ke nemalmultaj ŝibeaj familioj ankoraŭ konservas la notmanieron de antikvuloj, kiuj faris notojn per nodoj sur ŝnuro pri naskiĝo de infanoj, promociiĝo, geedziĝo kaj aliaj aferoj. Ekz., malgranda pafarko kaj sago signifas, ke en la familio naskiĝis filo; tola rubando signifas, ke oni naskis filinon; botoj signifas, ke knabo de la familio servas en armeo. La ŝibeoj nomas tian ŝnuron *Xilimama* kaj rigardas ĝin kiel dion de favora aŭspicio. Ordinare, oni spirale volvis ĝin kaj lokis ĝin en angulo de la ĉambro. Dum la Printempa








Surstrata vendado



Fruktobudo



Sur strato de Yining

kvanton kaj prezon deziratajn kaj konsentis per kapjeso kaj rifuzis per manskuo. Ĉar vintro alproksimiĝis, vestoj kontraŭ frosto estis tre ŝatataj. Iu komercisto pogrande vendis 2 400 parojn da ŝuoj por virinoj en unu tago. Iu komercistino kaj ŝia kunulo diris, ke en 1993 ili tien venis de sia hejmloko ĉe maro por vendi ŝuojn. Kvankam ili vendis je prezo iom malalta, tamen ili gajnis multe, ĉar ili vendis pogrande. Ilia jara neta enspezo iam superis 20 mil juanojn.

Posttagmeze, antaŭ la fermiĝo de la dogano je la 4-a kaj duono, la klientoj el Kazaĥstano devis transporti siajn varojn en buson por submetiĝi al kontrolo. Ĉiutage, ili transportas vivbezonaĵojn de Ĉinio al landoj de centra Azio. Ili venas antaŭtagmeze kaj revenas posttagmeze. Foje, ili alportis fajrilojn, fotografilojn, binoklojn kaj aliajn komercaĵojn el sia lando por ŝanĝi ilin kontraŭ ĉinaj varoj. Kompreneble, oni komercas plejparte per kontanta mono.

Mi informiĝis de la foira administranto, ke Korgas fariĝis la plej grava dogano en Xinjiang post sia restariĝo en novembro 1983. Ĝia plej granda jara varo-transporta kvanto superis 700 mil tunojn. Korgas servas ankaŭ al turismo. Ĉinio kaj Kazaĥstano ambaŭ veturigas aŭtobusojn por turistoj tra la dogano, kiu akceptas jare turistojn je pli ol 300 mil hom-fojoj. Post la stariĝo de tiu limregiona foirejo en aŭgusto 1992, ĉiutage miloj da komercistoj el diversaj lokoj de Ĉinio kaj centoj da kazaĥstanaj ĝin vizitis. Kaj la negoca sumo rapide kreskis ĉiujare. Laŭ plej nova informo, la negoca sumo de tiu foirejo en la unua duono de 1997 atingis 200 milionojn da juanoj, je 40% pli multe ol tiu en la sama periodo pasintjare. La foirejo fariĝis la plej granda tiaspeca en Ĉinio. ■



Ŝibeaj gejunuloj en  
arkpafado






# Tri nacioj harmonie vivas en la sama vilaĝo

de SHU MEI

**O**NI diris al mi, ke en la orienta parto de Interna Mongolio estas vilaĝo nomata Sanhe, 70% de kies loĝantoj estas koreoj kaj la aliaj estas mongoloj kaj hanoj. Dum dekoj da jaroj la membroj de la tri nacioj harmonie vivas en la sama vilaĝo kaj laboras por komuna prosperiĝo. Ilia reciproka respekto kaj firma unuiĝo estas multe laŭdataj. Jam de longe mi volis viziti ĝin.

Mi veturis tien per aŭto. Proksime de la vilaĝo la pejzaĝo tute ŝanĝiĝis. Malaperis la seka stepo kaj ĉie vidiĝis verdaĵo, mildiĝis ankaŭ la vento. En la rizkampo oni prikladis. La pejzaĝo impresis min kiel tiu de akva lando. Miaj kolegoj el suda Ĉinio kun ĝojo kriis: "Ho, mi revenis hejmlokon!" Ĉe la vilaĝo tri riveretoj kunfluas. Origine, la nomo de la vilaĝo Sanhe aludis kunfluan de la tri riveretoj, ĉar en la ĉina lingvo *sanhe* signifas trion. Kaj poste, ĝi signifas unuiĝon de la tri nacioj. Nun la vilaĝo havas 360 familiojn el pli ol 1 500 homoj. La vilaĝestro rememoris, ke en la 30-aj jaroj ĉ. 100 koreaj familioj transloĝiĝis tien de nordorienta Ĉinio por eviti la militan tumulton kaj tiam la fervoraj vilaĝanoj akceptis ilin. Tiele la tri-naciaj homoj harmonie kunvivis kvazaŭ fratoj. De tiam forpasis dekoj da jaroj, sed ne ŝanĝiĝis ilia reciproka helpo kaj respekto. La koreoj, kiuj lertas en riz-kulturado, inicis la

mongolojn kaj hanojn pri riz-kultivado, dum la mongoloj instruis al la samvilaĝanoj sian bestobredadon kaj la hanoj sian komercedon. La vilaĝanoj vivis pli kaj pli bone. En la pasinta jaro la pokapa enspezo estis 4 100 juanoj, egale al ĉ. 500 usonaj dolaroj. En la vilaĝo triono de la familioj havas telefonon kaj ĉiu familio — koloran televidilon, fridujon kaj motorciklon.



En la korto de korea familio

Ambaŭflanke de la asfaltita vojo estas bonordaj kortoj kun muroj el ruĝaj brikoj, preskaŭ samaj kiel tiuj en norda Ĉinio. En la vilaĝo oni malfacile distingas la naciecojn de la loĝantoj. Tiam estis ĝuste laborplena sezono kaj



Ĉe la kunfluejo de la tri riveretoj

la vilaĝanoj ĉiuj portis mallongajn vestojn kaj oni distingis la naciecojn nur laŭ la vestoj portataj de infanoj. Ĉe la rivero kelkaj virinoj lavis vestojn kaj knaboj petolis unu kun alia. Mi vidis, ke juna korea virino Kim kaj ŝia bopatrino, ĝoje babilante, lavas vestojn. La maljunulino senĉese laŭdis sian bofilinon pro ŝiaj forta kapablo en dommastrumado kaj respekto al la bogepatroj. Kim, korea knabino, edziniĝis al hana knabo. Por prizorgi la tutan familion kaj kontentigi ilin en manĝado Kim ellernis de sia bopatrino prepari manĝaĵojn kaj pladojn kun hana gusto. Ĉe nia interparolo venis la filino de Kim. La knabino diris al ni, ke ŝi lernas en elementa lernejo de la vilaĝo. Ŝi lernas la lingvojn hanan, korean kaj mongolan. "Kiam mi eniros en universitaton, mi do posedos du fremdajn lingvojn."



laborojn, dum viroj neniom prizorgis tion. Tiam la koreoj estis ĝojaj, se ili edzinigis sian filinon al hana junulo, sed ne volis havi hanan bofilinon pro ties "mallaboremo". Li rememoris, ke en la komenco post la geedziĝo vere estis multaj malagrabloj. Vidante, ke la edzino estas tre okupata per domlaboroj, li volis ŝin helpi, tamen pro tio lin ofte riproĉis liaj gepatroj. Poste li ŝajnigis sin tre rigora al sia edzino kun ĉeesto de aliaj, sed kiam restis nur li kaj lia edzino, li milde konsolis ŝin. En tago li staris apude, kiam lia edzino laboradis, sed vespere, post kiam liaj

La vilaĝestro konigis al mi, ke ĉiujare en la vilaĝo kelke da geknaboj sukcesas en la ekzameno por alta lernejo. Tio estas ĝojiga afero por la tuta vilaĝo. La vilaĝo donas al ili stipendion kaj ankaŭ iliaj gepatroj invitas samvilaĝanojn kune dividi la ĝojon kaj oni petas kelke da hanaj maljunulinoj prepari pladojn. Tiam dancas koreoj kaj kantas mongoloj.

Fakte, estas multaj festoj en la vilaĝo. Krom la tradiciaj festoj de la tri nacioj, la vilaĝo havas ankaŭ sian propran feston, t.e., maljunulan feston en la unua de aŭgusto. Tiutage oni gratulas ĉiujn pli-ol-60-jarajn maljunulojn, elektas modelojn de respekto kaj estimo de la maljunuloj kaj premias ilin. En ĉiuj familioj la gemaljunuloj estas la plej respektataj. Tie Nadam-festo diferencas de tiu de aliaj lokoj sur la Stepo de Interna Mongolio. Krom

la tradiciaj ĉeval-konkurso kaj lukto, estas ankaŭ ludo de trapezo de koreoj, ŝnur-tirado kaj diversaj atletikaj disciplinoj. La tago estas ankaŭ por la geknaboj. La bravaj knaboj estas facile atentablaj de la knabinoj. Amo ne konas nacian limon, sed tamen la malsamaj nacioj havas malsamajn kutimojn. Ĉu tio malhelpas ilian vivon?

Tion bone ekzemplis la geedza vivo de korea maljunulo Lee. Akompanate de la vilaĝestro, mi eniris en iun vastan korton, kie la maljunulo estis okupata je kulturado de batatoj. Tiu ĉi pli-ol-60-jara maljunulo havas patrinon, du filojn kaj unu nepon. Antaŭ 30 jaroj li edziĝis al iu hana knabino, pri kio liaj gepatroj tre malkontentis kaj preskaŭ rompintis kun li. Ilia kontraŭdiro mildiĝis nur post kiam li ekhavis filon. Antaŭe koreaj virinoj faris ĉiujn hejmm-

gepatroj endormiĝis, li lavis vestojn anstataŭ la edzino. Li diris: "Nun la gejunuloj estas multe pli feliĉaj ol ni, la geedza paro kune faras dommastrumadon." Lia unua filo sin okupas pri varotransportado, dum lia bofilino kulturadas teron. La dua filo laboras en kompanio de Pekino. Lia fianĉino, manĉura knabino, estis lia kunlernantino en la universitato. La maljunulo diris: "Nun la gejunuloj estas liberaj en geedziĝo kaj mi ne malhelpas ilin." En la korto kreskas legomoj kaj staras bonordaj domoj. Ĉiuj ĉambroj estas puraj kaj helaj. Lia edzino diris al mi, ke post edziniĝo ŝi ellernis vivi ŝpareme kaj labori diligente. Nun ilia familio havas du traktorojn kaj unu kamionon. La pokapa jara enspezo de la familio superis 10 000 juanojn. Ŝiaj parencoj, kiuj maltrankvilis pri ŝi, nun envias ŝian feliĉon. ■



**E**N la 5-a kaj la 6-a jc. a.K. en Ĉinio brilis grandaj pensulo-steloj — Laozi kaj Konfuceo. Iliaj doktrinoj poste iĝis taoismo kaj konfuceanismo, kaj ĉi tiuj kune kun enkondukita budhismo estas tri ĉefaj konsistigaj partoj de la tradicia ĉina kulturo. En evoluado de la ĉina kulturo, konfuceanismo okupis regantan pozicion en politiko kaj etiko, dum taoismo havis gvidan lokon en filozofia teorio. Taoismo profunde influis la psikon, kutimon, moron kaj pensmanieron de ĉinoj.

### DIAGRAMO DE TAJĜI-O KAJ OK TRIGRAMOJ

Taoismo originis de la praa religio de la matriarka komunumo en la primitiva socio.

Multaj vidis la Diagramon de *Tajĝi-o* kaj Ok Trigramoj, kiun kreis Fuxi (Fuŝji), tribestro antaŭ ĉ. 7 800 jaroj, t.e. en la transira periodo de la matriarka komunumo al la patriarka. La Diagramo devenis de la pripensado de Fuxi pri la origino kaj evoluo de la universo. La Diagramo konsistas el: centre, rondo — fiŝoj nigra kaj blanka, kies kapo ligiĝas kun la vosto de la alia, kaj ĉirkaŭe, ok trigramoj el “—” kaj “-”. *Tajĝi* signifas superan ekstremon. “—” reprezentas jin kaj “-” *jang*. *Jin* signifas negativon kaj femalon, dum *jang* pozitivan kaj masklon. Laŭ antikva ĉina filozofio, *jin* kaj *jang* estas du kontraŭaj flankoj de la naturo. Okcidentanoj nomas la Diagramon “magia simbolo en la Oriento”. La ok trigramoj reprezentas la 8 elementojn de la universo: ĉielo☰, tero☷, akvo☵, fajro☲, tondro☳, vento☴, monto☶, lago kaj rivero☱. Tiuj — kaj — simbolas, ke en la naturo *jin* kaj *jang* influas unu la alian, kaj la nigra kaj blanka fiŝoj figuras la rilaton inter *jin* kaj *jang*.

La Diagramo de *Tajĝi-o* kaj Ok Trigramoj estas simbolo de la ĉina taoismo.

# Taoismo en Ĉinio

de YANG TIANYI

*Mi volonte legus pli da artikoloj pri konfuceanismo kaj taoismo.*

**JERZY DEMBICKI**  
(Pollando)



La statuo de Fuxi

Taoismo havas influon al najbaraj landoj de Ĉinio. Ekz. la Diagramo ofte vidiĝas ankaŭ en orienta kaj suda Azio, kaj la figuroj de tiaj fiŝoj eĉ troviĝas sur nacia flago de iu lando. En la inaŭguroj de la lastatempaj du Aziaj Sportokunvenoj, oni prezentis *Tajĝiĉjŭan* kaj *Tajĝiĝjan* (ĉinaj luktartoj, la unuan oni ludas sen-arme kaj la duan oni ludas kun spado), kiuj montras la taoisman kulturon.

### REVO PRI LONGA VIVO KAJ FEIĜO

La praa religio en la epoko de Fuxi havis grandan influon ankaŭ sur la dinastiojn Xia, Shang kaj Zhou (21 jc. a.K. - 256 a.K.). Antaŭ 2 500 jaroj Laozi kaj lia skolo alte taksis femalon, negativon kaj mildecon. Tio verŝajne devenis de la matriarka kulto. Kaj dum la periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770 — 221 a.K.), iuj filozofoj studis pri dioj kaj feoj, influate de la kulto al dioj de la praa religio.

Multaj ĉinoj bone konas jenan antikvan legendon: Belulino Chang'e ŝtele englutis eliksiron, kiun ŝia edzo Yi petis de diino Xiwangmu. Pro tio Chang'e forflugis al la luno kaj fariĝis ĝia eterna loĝanto.

Oni scias, ke sur la luno tute ne ekzistas Chang'e, tamen la legendo estas rakontata de ĉiuj generacioj.

Antikva libro “Shan Hai Jing” (Libro de Montoj kaj Maroj), kiu enhavas multe da legendoj pri klopodoj de antikvuloj por eterna vivo. Kaj en sia verko “Tao De Jing” Laozi prezentis “metodon por vivi longe kaj sane”. Poste alia ĉina filozofo Zhuangzi (369?-286 a.K.) priskribis la vivon de senmortaj feoj per poeziaj vortoj. Poste naskiĝis Fang-Xian-Tao (Fang: nekromanciisto; Xian: feoj). En 221 a.K. la Unua Imperiestro de Qin-dinastio sendis


subulon ŝipvojaĝi kun 3 000 geknaboj por serĉi eliksiron. Ili ne trovis ĝin, tamen portis kulturon al Japanio.

Fang-Xian-Tao sekvis la teoriojn de Laozi kaj Zhuangzi kaj ankaŭ lernis de aliaj filozofiaj skoloj, kaj formiĝis Huang-Lao-Tao (Huang, aŭ Huangdi, estas prapatro de la ĉina nacio. Lao: Laozi), kiu estas burĝono de taoismo. En la jaro 142, Zhang Ling fondis Tianshi-Tao en Sichuan. La aliĝkotiĝo por Tianshi-Tao estis kvin *doŭ*-oj da rizo (*doŭ*, mezurunuo por greno, egalas al 10 litroj), do oni nomis ĝin ankaŭ Tao de Kvin Doŭ-oj da Rizo. Tianshi-Tao prenis Laozi kiel sian dion kaj lian libron "Tao De Jing" kiel la sanktan libron de taoismo.

Taoismo ne kredas inferon, metempsikozon kaj paradizon. Ĝi alte taksas la realan sanan vivon kaj helpon al aliaj, deziras eternan vivon kaj feiĝon kaj klopodas por unuiĝo de homo kaj Tao (aŭ kun universo). Taoistoj praktikis alkemion, sin kulturis, serĉis longvivigan metodon, iuj eĉ mortis pro la provoj. Oni malsukcesis en praktikado de alkemio, tamen rikoltis sciencajn eltrovojn. Ĉina alkemiisto, farmakologo kaj taoisto Ge Hong (284-364) havis gravan lokon en ĉi-flanka studo. Lia tekniko alkemia eniris Eŭropon tra arabaj landoj kaj disvolviĝis en la modernan eksperimentan kemion. Liaj medicinaj eltrovoj estis pli fruaj ol tiuj de la Okcidento je 1 000 jaroj. Lia teoria sistemo pri longa vivo akcelis la ŝanĝiĝon de la praa taoismo — multaj deziris fariĝi senmortaj feoj. Pro malsukceso de alkemio, oni turnis atenton al memkulturo.

La teorioj pri sanigo kaj longviviĝo iĝis grava parto de taoismo. *Ĉigong*-o kaj "ĉambraj agmanieroj" de taoismo restas ankoraŭ utilaj al la modernaj higiena kaj seksa sciencoj.

Inter la 3-a kaj 5-a jarcentoj taoismo plenkreskis en batalo kontraŭ kaj lernado de la alveninta budhismo. Taoismo prosperis



Taoisma ceremonio en la templo Baiyunguan

inter la 6-a kaj 14-a jarcentoj kaj poste dekadencis. Tamen multajn flankojn de la tradicia ĉina kulturo profunde influis la teorioj de taoismo pri filozofio, teologio, vivo, belarto, muziko, militscienco, farmakologio, sanprotekto, astrologio kaj aŭguro. Multaj ĉinoj ne konas la dogmon de taoismo, tamen pie kultas di-ojn en taoisma templo. Eĉ iuj ateistoj kondukas laŭ la filozofio kaj vivsperto de taoismo. Ĉinoj kutimis esploradi, antaŭ konstruado de domo, direkton de ĝia porde kaj ĝian ĉirkaŭaĵon kaj elekti bonaŭguran daton por geedziĝo kaj vojaĝo. Tiuj kutimoj devenis de taoismo.

## PERSPEKTIVO

En la lastaj jaroj taoismo reprosperiĝis en Ĉinio. Estas multaj taoismaj temploj en montaroj. Ankaŭ en grandaj urboj vidiĝas taoistoj en froko. Taoismo havas

severan principon, tial estas nur ĉ. dekmil taoistoj en temploj. Oni ne scias kiom da taoistoj vagadas aŭ hejme loĝas, kaj sennombraj homoj kredas je taoismo. En la 1-a kaj 15-a ĉiumonate laŭ la ĉina luna kalendaro, venas al la taoismaj temploj multaj homoj por kulto. La temploj ricevas multajn mondonacojn, kiuj sufiĉas ne nur por ĉiutaga elspezo, sed ankaŭ por pligrandigo de la temploj.

La moderna industrio alportas multajn problemojn, pro tio oni pli bone komprenas taoisman ideon reveni al la naturo. Tra la tuta mondo multaj studas taoismajn kulturon kaj higienon. Fari bonon, helpi aliajn, toleri sed ne batali, vivi modeste kaj honeste, ami pacon, agi trankvile...

tiuj taoismaj instruoj influas multajn homojn. Alilandanoj venis al Ĉinio por fariĝi adeptoj de taoismo. Iu prenis "Tao" kiel spiritan standardon por sia prezidenta elektado. Eĉ iu prezidento alte taksis "trankvilemon kaj senfaremon" de taoismo kaj citis dum sia enoficiĝa parolado la frazon el "Tao De Jing" — "Regi grandan landon similas al kuro de eta fiŝo". ■



Diagramo de Taiĝi-o kaj ok trigramoj

**T**IO okazis en la 40-aj jaroj. Sur muro de la domo de maljuna ĉina elmigrinto en Hindio pendis vipo, kiun sciivolis gastoj. La maljunulo diris al ili: “Tio estas uzata por vipi miajn filojn kaj nepojn, se ili ne bone lernas la ĉinan skriblingvon.” Laŭ li, la 5 000-jara civilizacio de Ĉinio konserviĝis en la lingvo, longhistoria vejno de spirito kaj granda koheremo por la idoj de Yan kaj Huang, la prapatroj de la ĉina nacio. Ĝuste pro tio, multaj ĉinoj, kvankam longe vivas fore de la patrolando, konstante amas la ĉinan lingvon. Pli kaj pli intensiĝas la pasio de diverslokaj eksterlandaj ĉinoj al ĝi kaj en iuj landoj leviĝis entuziasmo por la ĉina lingvo.

### “ĈINSTILA PREĜEJO”

Frumatene de ĉiu sabato la patro vekas siajn du filojn: “Elitiĝu kaj matenmanĝu. Jam tempo iri al la ĉinlingva lernejo!” Li laboris en komputera kompanio de Usono jam dek jarojn. Ĉiun semajnofinon li akompanas siajn filojn al la lernejo funkciigata de ĉinoj, kiam multaj familioj vizitas preĝejon aŭ ekskursas, malgraŭ vento kaj pluvo. Eksterlande multaj ĉinoj faras la samon. Ili ĉinlingve salutas sin reciproke por krei lingvan medion por la geknaboj kaj pli intimigi sin.

Tiaj lernejoj estas nomataj “ĉinstilaj preĝejoj”, kun historio de cent jaroj en Usono. Komence, en formo de familia privata lernejo ili funkciis en stratoj de ĉinoj en grandaj urboj. Pro rapida kreskado de la nombro de ĉinaj studentoj en Usono ekde la 80-aj jaroj leviĝas unuj post

# Pasia amo al la ĉina lingvo

aliaj ĉinlingvaj lernejoj, kie ĉinaj studentoj instruas ĉefe fonetikon de la ĉina lingvo kaj simpligitajn ĉinajn ideogramojn. Nun en proks. 30 ŝtatoj de Usono estas pli ol 100 tiaj lernejoj.

Antaŭ kvar jaroj ekfunkciis en Teksaso la Ĉinlingva Lernejo Granda Muro. De tiam centoj da ĉinoj ofte kunvenas en ĝi anstataŭ en aŭlo de universitato. Tie ili partoprenas en la kursoj de uŝuo, ĉigong-o, ĉina ŝako kaj kaligrafio kaj ankaŭ aprecas ĉinan popolan muzikon, ĉeestas prelegon pri la nuntempa ĉina literaturo kaj legas gazetojn kaj ĵurnalojn en la ĉina lingvo. Multaj influhavaj ĉinlingvaj lernejoj luigas videobendojn pri ĉinaj pejzaĝoj, rakontoj kaj aliaj.

Ne mankas similaj lernejoj ankaŭ en aliaj landoj kaj en ili estas uzataj ne tute samaj lernolibroj. La Ĉinlingva Lernejo de Montrealo, Kanado, havas 500 ĉinajn geknabojn, kiuj lernas la ĉinan lingvon kaj ĉinan kulturon.

En Japanio nemalmultaj ĉinoj instruas siajn geknabojn, uzante lernolibrojn eldonitajn en Ĉinio.

### ANIMO DE ĈINAJ IDEOGRAMOJ

Eksterlandaj ĉinoj ege deziras, ke iliaj gefiloj ĉerpu ion utilan ne nur el la moderna kulturo de la Okcidento, sed ankaŭ el tiu de Ĉinio. Kiel diris s-ino Tao Kai, estrino de la Ĉinlingva Lernejo de Kembriĝo de Usono, “Nia celo estas, ke influate de la du kulturoj, la lernantoj fariĝu elstaraj personoj konkuremaj.” Laŭ la tradicio en Ĉinio oni respektas instruistojn kaj alte taksas edukadon, tial oni esperas, ke la instruistoj estos severaj al siaj lernantoj. Tamen, multaj lernantoj pli al kutimiĝis al la ekzotika edukado kun pli da libereco kaj trovis, ke tre malmultaj lernantoj el aliaj landoj lernas sian gepatran lingvon. Knabo Ji Ran (Ĝji Ĵan) plendis, ke liaj gepatroj ne permesis lin festi datrevenon de naskiĝo kune kun siaj samklasanoj, sed sendis lin lerni la ĉinan lingvon. El tio videblas, ke ne estas facile instrui la ĉinan lingvon. Kvankam inter la instruistoj ne mankas pormagistriĝaj kaj pordoktoen ili devas serĉi taŭgan instrumentodon en kolizio de la du edukkonceptoj.

Multaj knaboj de eksterlandaj ĉinoj ŝatas pentradon. Ĉi-



Sur la Granda Muro





Subskribado

naj ideogramoj apartenas al hieroglifo. Origine, ĉiu ideogramo figuris kiel bildo. Instruistoj de la menciita lernejo pentris sunon, lunon, monton kaj riveron sur la nigra tabulo kaj instruis al la lernantoj la koncernajn ĉinajn ideogramojn signantajn ilian sencon. Samtempe kun tio, la instruistoj konigis la ĉarman Huangshan-monton, torentan Flavan Riveron k.a. por intensigi la amon de la lernantoj al la patrolando. Ĝenerale dirite, la ĉinaj ideogramoj, kiuj signas la sencon de abstraktaĵo kaj komplikaĵo, estas desegnitaj surbaze de siatempaj sociaj konceptoj kaj moroj. Ni ekzemplu la ĉinan ideogramon 孝, kiu signifas respekton de posteuloj al la antaŭuloj. Ĝi konsistas el du partoj, t.e. maljunulo 老 kaj lia filo 子. La ideogramo figuras, ke la maljunulo kun longaj haroj iras subtenate de sia filo. Sendube, klarigante la sencon de tiu ĉi ideogramo, la instruistoj diras al la

lernantoj: “Respekti la maljunulojn kaj ami la infanojn estas nacia moralo de Ĉinio. Jen en tio kuŝas la animo de ĉinaj ideogramoj. Iom post iom la lernantoj trovis, ke ĉinaj ideogramoj estas interesaj, kvankam malpli facile legeblaj kaj skribeblaj, ol fonetika skribo.

### PONTO POR KONI LA ĈINAN KULTURON

Ĉinaj geknaboj eksterlandaj kutime lernas en ĉelokaj lernejoj komfortaj. Iafoje okazis al ili io malĝoja. 7-jara knabino, reveninte hejmen de la lernejo, plurfoje plendis al sia patro, ke iu knabo mokis ŝin, ke ŝi havas malgrandajn okulojn, flavan haŭton kaj malpurajn genuojn. La patro opiniis, ke en tio kulpas ne la knabo, sed la rasa diskriminacio ekzistanta en la socio. Foje, en la elementa lernejo iris leciono kun la temo pri diverslandaj kulturoj. Li, fizika profesoro de universitato, donis

al la lernantoj multe da ekzemploj por eksplicki la veron, ke ĉiuj nacioj havas siajn fortaĵojn kaj eminentajn kulturojn kaj ili devas respekti sin reciproke kaj lerni unu de alia. Fininte la eksplickon, li donacis al ĉiuj lernantoj paĝosignon kaj kompletan da belaj ĉinaj poŝtmarkoj, ĉiu kun la nomo de la ricevanto bonorde skribita en la ĉina lingvo. Ekde tiam ne estis plu la malpaco inter la lernantoj. Poste, li ekfunkciigis kurson de ĉinaj kantoj kaj teatroj en ĉeloka ĉinlingva lernejo kaj instruis al la lernantoj popolanton, jangge-dancon kaj pekinan operon. Li diris: “Niaj posteuloj devas scii ne nur ĉi-

najn ideogramojn, sed ankaŭ la kvintesencon de la ĉina kulturo, inkl. de la kreivo de niaj prapatroj.”

Iuj eksterlandaj ĉinoj revenas al la patrolando kun siaj infanoj en oportuna okazo, por ke la infanoj pli bone konu la ĉinan kulturon. La 8-an de aŭgusto 1997 okazis en Pekino la aktivado “Tago de Eksterlandaj Ĉinaj Infanoj por Lerni la Ĉinan Lingvon”. Ĝin partoprenis pli ol 160 infanoj kaj iliaj gepatroj el 13 landoj. La plej juna el la infanoj estis dujara. Tiutage la infanoj multe distris sin per kunvivado kaj grimrado sur la Grandan Muron. 14-jara knabino Kang Xin el Belgio kun emocio diris: “Ĉiuj montoj de mia patrolando majestas per sia aparteco. Kaj la konstruaĵoj kun belaj traboj kaj kolonoj distingiĝas per delikateco kaj imponco...” La vortoj montris ŝian diligentecon en lernado de la ĉina lingvo. ■

## MATENA LEGOMBAZARO

Matene en Pekino, krom parkoj, kie oni faras fizikan ekzercadon, la plej movoplenaj lokoj estas legombazaroj.

Jen matena legombazaro en la urbo-centro. Iu maljunulino, ŝarĝinte sian malgrandan triciklon per la ĵus aĉetitaj legomoj, diris: "En la matena bazaro la legomoj estas malkaraj, freŝaj kaj multspecaj. Estas tre oportune, ke post promenado mi vizitas ĝin kaj aĉetas iom da ili." Eĉ iuj



En matena legombazaro

oficistoj aĉetas legomojn en la proksima matena bazaro antaŭ ol iri al laborloko.

Nun en la loĝ-kvartaloj de Pekino estas multaj matenaj bazaroj, kie oni aĉetas legomojn kaj flankmanĝaĵojn. Tie la legomoj estas pli malkaraj ol tiuj en la ordinaraj bazaroj je 10%-20%, ĉar la matenaj bazaroj plejparte troviĝas ĉe stratoj, sur malgranda placo de loĝkvartalo k.a., la bazaristoj pagas nur malmulte por bazaro-administrado, sen lui fiksan vendotablon, sekve la kapitalo malaltiĝas kaj la prezoj malleviĝas.

La legomoj en la matena bazaro plejparte estas ŝirkolektitaj samtage. Antaŭ tagiĝo bazaristoj triciklas al pogranda bazaro, kie vendiĝas multspecaj legomoj, vivaj

fiŝoj, salikokoj, birdoj kaj ovoĵoj.

90% el la matenaj bazaristoj venis de aliaj lokoj. Ili ankaŭ luis fiksan vendotablon en agrikulturaĵaj foiroj. Post fermiĝo de la matenaj bazaroj ili tuj foriras kaj la matenaj bazaroj estas tuj bonordigitaj.

## FAMILIAJ KONTRAKTOJ

Ke unue oni subskribas familiajn interkonsentojn kaj poste geedziĝas, tio estas akceptita de iuj urbaj gejunuloj en Ĉinio.

Fakuloj opinias, ke kontraktigo de familia vivo rezultas el influo de la merkata ekonomio sur la familio. En la lastaj jaroj vivo de la loĝantoj en grandaj urboj fariĝis ĉiam pli enhavoriĉa kaj memstareco por la geedzoj iom plifortiĝis. Iuj junaj geedzoj ne volas forlasi sian antaŭan rondon nek fremdiĝi al siaj amikoj, aŭ deziras havi pli multe da libertempo kaj mem decidi la financajn aferojn por plua lernado. Sekve, diversspecaj kontraktoj kaj interkonsentoj inter la geedzoj aperis en tiaj familioj.

Tiuj kontraktoj kaj interkonsentoj klare difinas la respektivajn laboron, lernadon, dommastrumadon kaj elspezadon de la familio. Ĉar ili estas memvole faritaj de la geedzoj post ripetada interkonsiliĝo, tial la geedzoj rigore observas ilin. En eventualaj okazoj, ili indulgas kaj subtenas unu la alian, kaj tiele familiaj konfliktoj estas evititaj.

Krome, la familiaj interkonsentoj raciĝis la familian elspezon: La ĉiutagaj elspezoj estas porciigitaj laŭ la enspezo. Nur kiam oni volas aĉeti meblaron, elektran aparaton aŭ aliajn valorajn objektojn, ili interkonsiliĝas, sekve malpliĝas blinda aĉetado aŭ defecito kaŭzata de nur unu homo.

En Ĉinio oni eksedziĝas ĉefe pro malrespekto de privateco, manko de libereco, spirita premateco aŭ rezigno de familia devo far unu flanko. La kontraktoj havigas pli da individua spaco al la geedzoj, tial, fakuloj antaŭdiris, ke tio estos imitata de iuj familioj.

## MOROJ KAJ KUTIMOJ DE ISLAMANOJ

Ningxia (Ningŝja) situas en nordokcidenta Ĉinio. Ĝi estas ununura huj-nacia aŭtonoma regiono en Ĉinio. Tie pulsas moroj kaj kutimoj de islamanoj.

Huj-oj kredas je islamismo. Tie en ĉiuj grandaj loĝlokoj de huj-oj troviĝas moskeo. La taskoj de islamanoj estas recito de korano, kulto al Alaho, fastado, monofero (oferi 1/40 de sia superflua mono al malriĉuloj aŭ moskeo) kaj pilgrimado (laŭ ekonomia kondiĉo, ĉiu islamano devas pilgrimi al Mekko almenaŭ unufoje dum la tuta vivo). Ĉiutage oni faras 5-foje preĝadon en difinitaj horoj kaj ĉiuvendre ili devas fari tion nepre en moskeo. Antaŭ preĝado ili devas sin lavi. La lavado dividiĝas en la grandan (sin bani) kaj malgrandan (nur lavi al si la vizaĝon, buŝon, nazon, manojn kaj piedojn). Por ordinaraj preĝoj ili faras malgrandan lavadon kaj grandan por geedziĝo, funebrado kaj festoj.

Huj-oj estas tre puramaj, krom individua kaj hejma higieno, ili aparte atentis la manĝaĵan purecon. Korano difinas, ke islamanoj ne fumu nek drinku. Tamen ili alte taksas tetrinkadon. Ili trinkas teon per taso kun kovrilo. En la taso krom teo estas ankaŭ jujuboj, longanoj (*Euphoria longan*), sezamgrajnoj, liciberoj (*Lycium*), sekvinberoj kaj kando, sekve la teo estas diverskolora, dolĉa kaj nutritiva. La longviveco de lokaj maljunuloj eble havas ian rilaton



Sur strato de huj-a loĝkvartalo

kun tia tetrinkado.

La vestoj de huj-oj distingiĝas per kapvesto. Viroj portas blankan ĉapon kaj en varmaj tagoj blankan veston kun nigra veŝto ekstere. Virinoj portas kufon surkape, laŭ kies koloro oni povas diveni ilian aĝon kaj edzinecon.

La geedziĝa ceremonio de huj-oj estas spektakla, dum la funebrado simpla. En la funebra procesio ne estas funebraj skriboj, floroj nek entombigitaĵoj. En tragika litaniado de Korano altprestiĝa imamo metas la mortinton en tombon kaj la familianoj silente esprimas sian funebbron.

## ĈINIO NE PRIFOSOS IMPERIESTRAJN MAŬZOLEOJN EN LA PROKSIMA ESTONTECO

La terakotaj legioj de la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221-206 a.K.) per sia imponeco kaj arkeologia valoro famiĝis tra la tuta mondo. Sed antaŭ nelonge iu arkeologo malkaŝis, ke origine la terakotaj militistoj kaj ĉevaloj estis bele lakitaj. Pro longatempa restado subtere la lako adheriĝis al tero. Pro teknika kaŭzo la elterigitaj terakotaĵoj perdis sian koloron. Kun tempopaso la nekompletaj lakpecoj volviĝis, defalis, kaj fine restas nur grizaj terakotaĵoj.

En 1956 el la pekina maŭzoleo de Ming-dinastio (1368-1644) elfosiĝis granda kvanto da silkaĵoj, kio faris sensacion en la mondo. Fakuloj alprenis rimedojn plej avangardajn siatempe en la mondo por konservi ilin: Oni ŝmiris la robon de la imperiestro Zhu Yijun kaj aliajn silkaĵojn per vitra gumo kaj hermetigis ilin, esperante, ke tiuj elterigitaĵoj, simbolo de "imperiestra potenco", konserviĝos por eterne. Sed neatendite, post 20 jaroj la vitra gumo eluziĝis kaj parte splitiĝis. Je ajna tuŝo la robo dispeciĝos aŭ pulvoriĝos.

Pro tio antaŭ nelonge la ĉina registaro anoncis, ke ĉar Ĉinio ankoraŭ ne posedas sciencajn teknologiojn kaj rimedojn por konservi historiajn restaĵojn, tial ĝi ne plu memvole prifosos imperiestrajn maŭzoleojn en la proksima estonteco.



# Mitoj kaj legendoj pri la Lakta Vojo

de BERNARD GOLDEN (Hungario)

**I**NTER la grandaj amasoj da steloj dise troviĝantaj en la kosmo, la plej signifoplena por loĝantoj de la Tero estas la Galaksio, nomata ankaŭ la Lakta Vojo, ĉar situas en ĝi la Suno kune kun ties planedoj kaj iliaj satelitoj.

## PRI DEVENO DE LA LAKTA VOJO

Estis la antikvaj helenoj, kiuj donis la nomon Lakta Vojo al la Galaksio. En la helena lingvo la vorto *galaksias* devenas de la substantivo *gala* “lakto”. En aliaj lingvoj la helenaj vortoj estas tradukitaj por formi la respondajn nomojn. En la helena mitologio estas klarigo pri uzo de la vorto “lakto”.

Plej probable la plej frua mito rilatanta al la estiĝo de la Lakta Vojo temas pri la duondio Heraklo, filo de Zeŭso kaj Alkmena. La diino Atena persvadis Heran, edzinon de Zeŭso, ke ŝi mamnutru la bebon. Sed la eta Heraklo tiel forte suĉis, ke la diino ne povis elporti, do ŝi forpuŝis la infanon de si, kaj la laktogutoj, dise ŝprucantaj sur la ĉielon, fariĝis la Lakta Vojo.

Ankaŭ en la armena mitologio estas rakonto pri la lakta deveno de tiu ĉiela lumstrio. La virino Mardagajd, lupfantomo, kapabla ŝanĝi sian formon, deziris disŝiri virinon, kiu vizitis ŝin. Kiam ŝi pikis la bruston per ponardo, elŝprucis lakto, kiu nun estas videbla kiel la Lakta Vojo.

## ALIAJ SUBSTANCOJ, KIUJ FORMIS LA LAKTAN VOJON

La popola imago elpensis aliajn manierojn formi la grandan surĉielan vojon, do ĝi ricevis diversajn

nomojn en la respondaj mitoj. Ĉe la armenoj ĝi estas “la pajloŝtelista vojo”, ĉar Vahagn, la armena prapatro, en malmilda vintro ŝtelis pajlon de Barsam, praulo de la asirianoj, kaj iris kaŝi ĝin sur la ĉielo. Laŭ la vojo kondukanta tien li faligis malgrandajn pajlerojn, kaj ili restis sur la ĉielo kiel longa hela strio.

Estas simila rakonto en la hungara folkloro pri Beres, terkultiva laboristo, kiu ŝtelis farunon kaj fuĝis ĉielen en la direkto al la konstelacio Granda Urso. Survoje li interbatiĝis kun iu stelo kaj faladis la faruno, kiu blankigis lian interstelan vojon.

En Nordameriko la ĉeroki-indianoj nomas la Laktan Vojon “kie la hundo kuris”. Temas pri hundo, kiu havis la kutimon ŝteli grion de maiz-muelilo, posedata de la homoj loĝantaj en la sudo, kaj forkuri kun ĝi norden. Dumvoje la hundo dissemis la grion, kiu markis lian iradon sur la ĉielo.

En mito de la boŝmanoj el suda Afriko estis viro, kiu metis siajn malsekajn sandalojn tro proksimen al fajrejo. Unu el la sandaloj cindriĝis kaj la alia nur duone brulis. Koleriĝinte, la viro ĵetis la duone bruligitan sandalon en la ĉielon, kaj el ĝi estiĝis la luno. Poste lia filino surŝutis sur la ĉielon la cindron de la dua sandalo, kaj tiel formiĝis la steloj kaj la Lakta Vojo.

## VOJO DE BESTOJ, BIRDOJ, HOMOJ KAJ DIOJ

Loĝantoj en la nordaj partoj de Eŭrazio imagis, ke la Lakta Vojo estas pado, sur kiu kutime vojaĝas aŭ migradas rolantoj en iliaj mitoj. Pluraj finnougraj popoloj konas ĝin kiel “la pado de la birdoj”. Ili uzas ĝin en vintro por atingi la varman

regionon de Birdlando, kaj printempe ili revenas norden laŭ la sama pado, do ili neniam devojiĝas. La samaj popoloj kredas, ke la animoj de mortintoj estas birdoj, do ankaŭ ili sekvas migrantajn birdojn. Pro tio la Lakta Vojo ricevis la nomon “vojo de mortintoj”.

Mito de iuj indianoj de Nordameriko rakontas, ke la mortintoj estas akceptataj de stelo ĉe la norda ekstremaĵo de la Lakta Vojo, kie ĝi disforkiĝas. Tie la bravaj batalintoj estas direktitaj al la malklara kaj malfacile irebla branĉo, dum la virinoj kaj homoj mortintaj pro granda aĝo sekvas la pli helan kaj facilan padon. La animoj iradas suden kaj ĉe la fino de la ĉiela vojo, kie atendas ilin la anim-stelo, ili trovas sian hejmon. En la poemo *Hiavata* de la usona verkisto Henry Wadsworth Longfellow, Nokomis, la maljuna indianino, kiu vartas la infanon Hiavata, instruas lin pri la natura mondo kaj priskribas la Laktan Vojon jene: ŝi

*Montris blankan vojon sur ĉielo,  
Vojon de l' fantomoj kaj de l' ombroj  
Transirantan rekte la ĉielon,  
Densan pro fantomoj: kaj la ombroj.*  
(Tradukita de Brendon Clark)

## LA VOJO DE ARMEOJ

En la hungara folkloro la Lakta Vojo estas nomata “la vojo de armeoj”. Du legendoj klarigas tiun nomon. Ekzistas kredo, ke, kiam la prauloj de la hungaroj forlasis Azion, ili sekvis la gvidon de la Lakta Vojo al sia nova loĝ-teritorio en Eŭropo. Somere en la suda kaj orienta Rusio la direkto de la Lakta Vojo estas de oriento al okcidento. La dua legendo rakontas pri Csaba, la plej juna filo de Attila, la granda huna reĝo, kiu rajdos sur la Lakta Vojo kun siaj 15 000 mortintaj soldatoj por savi la sikulojn, hungarojn el Transilvanio, kiuj estas la posteuloj de la hunoj, kiam ajn ili estas endanĝerigitaj.

Ankoraŭ du popoloj havas legendon pri uzo de la Lakta Vojo fare de militisto, kiu revenos por helpi sian popolon. Batu Kan estis mongola militestro de la 13-a jc., la lasta ĥano de sia popolo. Li transformiĝis en cignon, kiam li perdis sian regnon, sed iam en la estonteco li revenos por forpeli la invadintojn. Li vojaĝos sur la Lakta Vojo, kiu havas la nomon “vojo de Batu”.

## ALIAJ VOJAĜANTOJ SUR LA LAKTA VOJO

La Lakta Vojo estas kutime uzata de siberiaj ŝamanoj dum iliaj spirit-flugoj al aliaj partoj de la kosmo. Doh, la unua ŝamano, rolanta kiel kulturheroo kaj kuracanto, fuĝis al la suno laŭ la Lakta Vojo, kiu tiam fariĝis videbla.

La jakutoj nomas tiun vojon “la migradvojo de Dio”, ĉar ili kredas, ke dum la kreado de la mondo, Dio sekvis ĝin, kiam li migradis sur la ĉielo.

Ankoraŭ unu siberia popolo havas miton pri heroo vojaĝanto, Ij. Li ekiris, kiam blovis malvarma orienta vento, sed ĉar li ne estis sufiĉe varme vestita, li tute frostiĝis. Sur sia ĉiela iradvojo Ij lasis spurojn malantaŭ si, kiuj estigis la Laktan Vojon, nomatan “la ĉiela vojo de Ij”.

Grava rolantino en la hungara folkloro estas Tünder Ilona (Feino Helena), kiu respondas al la feina reĝino de popolarakontoj aliloke en Eŭropo. En mitoj pri ŝi la Lakta Vojo estas konata kiel “la vojo de la feinoj”, laŭ kiu ili vojaĝas ĉirkaŭ la mondo. La disbranĉiganta parto de la Lakta Vojo nomiĝas la vojturniĝo, kie la feinoj returnas sin por daŭrigi sian vojon.

## VETURILOJ SUR LA LAKTA VOJO

La Lakta Vojo servis ankaŭ kiel vojo por veturiloj. La armena dio de tondro kaj fulmo, Assz, veturas en kaleŝo ĉiam sur la Lakta Vojo. Dum irado la veturilaj radoj kaj la hufferoj de la ĉevaloj krakas kaj bruegas sur la malebena vojo. Tio kaŭzas la tondron, kaj la radoj ĵetas la fulmon. En la helena mitologio la plej bone konata rakonto pri ĉiela veturado rilatas al Faetono, la filo de la sun-dio Helioso. Por ricevi pruvon, ke li estas duondio, la filo petis, ke la patro permesu al li konduki la sunĉaron. Laŭ la pitagorana versio de la mito, la aŭdaca junulo gvidis la ĉevalojn sur la Lakta Vojo, sed li ne sukcesis teni la konduk-rimenojn. La ĉevaloj senbride impetis kun la sunĉaro kaj, alproksimiĝante al la Tero, bruletigis la surfacon. Por savi la Teron, Zeŭso detruis la ĉaron per fulmo kaj mortigis Faetonon.

## LA LAKTA VOJO EN LA KOSMOGRAFIO DE POPOLOJ DE NORDA EŬRAZIO

La kosmografio aŭ mondbildo en la mitologio de norda Eŭrazio diversmaniere klarigas la funkcion de la Lakta Vojo. La finnougroj identigas ĝin kun la Monda Arbo. La estonoj rakontas, ke estis kverko, kiu kreskis alte kaj dike kaj volis iri ĝis la ĉielo kaj malsupren ĵetadi la nubojn. Ankaŭ la finnoj rakontas pri enorma kverko, kiu per sia krono kovris la sunon kaj la lunon. Sed venis el la maro hometo, kiu dehakis la arbon. Tiu faligita arbo estas la Lakta Vojo. La turkotataroj kredas, ke la ĉiela volbo estas tendo, kiun apogas arbo, kaj la Lakta Vojo estas la kudraĵo de la tendo. La steloj estas truoj en la alta tegmento de la ĉiela tendo kaj servas por lumigado. Ili disŝutiĝis el la Lakta Vojo, kaj tiel la homoj povas vojaĝi sur ĝi kiel sur ponto. ■



# Ĝojo en rokgrimpado

de XIANG HONG

*Rokgrimpado, deveninta de montgrimpado, naskiĝis en Eŭropo en la 50-aj jaroj kaj antaŭ dekkelkaj jaroj enkondukiĝis en Ĉinion. Kiel la ĉinoj disvolvis la movadon kaj kion ili spertis en ĝi? Nia raportistino Xiang Hong intervjuis membrojn de la Pekina Junulara Rokgrimpa Teamo.*

SUNO


## EKŜATO DE ROKGRIMPADO

“Se ekzistus antaŭvivo, mi estus monto en la antaŭvivo,” diris Dai Yun. Tiun jaron, kiam li estis 20-jara, li unuafoje iris sola en montaron por pentrado. Piedirante sur veproj kaj grimpante sur krutaĵon, li sentis sin trankvila kiel en sia hejmo.

En 1983 Dai Yun fariĝis laboristo. Tiam li amikiĝis kun artistoj, kiuj ofte kolektiĝis proksime de lia hejmo. Rimarkinte lin senfara, ili demandis: “Amiko, kial vi ne lernas pentradon de ni?” Tial Dai Yun prenis penikon kaj ofte eniris montaron por pentrado.

Por aktivi en montaro, necesas montgrim paj ekipaĵoj. Dai Yun serĉis en la tuta Pekino, tamen trovis neniun butikon vendantan montgrim pan ekipaĵon. Tiam la artisto-amikoj proponis: “Kial vi ne petas helpon de la montgrim pa grupo?” Tial Dai Yun vizitis la Ĉinan Montgrim pan Asocion kaj tie konatiĝis kun Shang Ziping. Shang estas tia homo, kiu rigardas montgrim padon kiel sian vivon. Komuna amo al monto amikigis ilin je la unua vido. Shang ne nur pruntis al li ekipaĵojn, sed ankaŭ instruis al li kaj liaj kamaradoj bazajn sciojn pri montgrim pado, kiaj farado de maŝo kaj nodo, kaj protektaj rimedoj. De Shang li unuafoje aŭdis la vorton rokgrimpado. “Tuj kaptis min la impresoj sin apogi sur krutaĵo. Mi

konsciis, ke mia interparolo kun krutaĵo estas la plej granda ĝojo en mia vivo,” ĉiufoje en tia momento Dai Yun nereteneble menciis sian mentoron. “Mi kore dankas s-ron Shang. Li kondukis min



En trejnado

en la mirindan mondon de rokgrimpado, kie kune ekzistas malfacilo kaj ĝojo.”

## BALETO SUR KRUTAĴO

Sur krutaĵo la rokgrim panto devas trovi ĝustajn kavon kaj apogpunkton por flankeniĝi, suprenleviĝi, salti ktp. Moviĝi sur vertikala krutaĵo estas kaj stimulo kaj ĝuo. Tial rokgrim pado estas nomata ankaŭ baleto sur krutaĵo. Dai Yun diris, ke elstara rokgrim panto devas esti gracia kaj fleksebla kiel baletisto, forta kiel halterlevisto, aplomba kaj sagaca kiel ŝakludisto; kaj tiuj kondiĉoj haveblas nur post longtempa peniga kaj seka trejnado.

Depost 1985, kiam fondiĝis

la Pekina Junulara Rokgrim pa Teamo, Dai Yun pasigis preskaŭ ĉiujn siajn postlaborajn horojn en trejnado de rokgrim pado aŭ korporforto. Je la komenco la teamanoj lernis de Shang Ziping fundamentajn ekzercojn, kiaj firmteno, trejnado, sinapogo, paŝado ktp. En 1986, la Nagana Monto-Asocio de Japanio monhelpis por konstrui artan rokgrimpejon en la Montgrim pa Trejnejo, 40 km. for de Pekino. En ĉiu semajnofino, Dai Yun kaj liaj kolegoj venis tien, starigis tendon por noktado kaj bruligis branĉetojn por kuirado. Iam okazis, ke pro duontaga trejnado la tremantaj manoj alportis duonbovlon da nudeloj en la buŝon kaj faligis la ceteran duonbovlon sur la teron. En 1988, la simple ekipita teamo partoprenis la Duan Tutlandan Rokgrim pan Konkurson kaj gajnis la trian lokon per sia totala poentaro.

Rokgrim pado, dum la dekkelkaj jaroj post kiam ĝi enkondukiĝis en Ĉinion, ĉiam estas sporto konata de malmultaj. Pri tia fenomeno Dai Yun havas sian komprenon: “La prospero de rokgrim pado estas bazita sur la leviĝo de la nivelo de materiala vivo. En la pasintaj jaroj la ekonomio de Ĉinio rapide disvolviĝis, tial mi kredas, ke pli kaj pli multiĝos la partoprenantoj de rokgrim pado.” Maje de 1996 la teamo organizis socian aktivadon tiuf flankan kaj donis teknikan direktadon al la partoprenantoj. Tio





Grimpado sur neĝan rokon

vekis grandan eĥon de la socio. Multaj homoj ekŝatis tiun sporton, tuj kiam ili kontaktis ĝin. Verŝajne konfirmiĝos la antaŭdiro de Dai Yun.

## ĜOJO KAJ ĈAGRENO

“La modernaj homoj estas tro for de la naturo. Mi rokgrimpas unu fojon en ĉiu semajno, tio povas revenigi min en la naturon kaj liberigi min de malpacienco kaj streĉeco en la vivo. Mi estas neapartigebla de rokgrimpado, same kiel fiŝo de akvo.” La maldika kaj malalta Dai Yun fakte ne estas parolema, sed je mencio pri rokgrimpado li tuj fariĝos parolema.

“Influante de Dai Yun, mi membriĝis al la rokgrimpa teamo. Antaŭe mi estis malforta kaj pensis, ke mi eble ne fariĝos elstara rokgrimpanto, tamen mi volas servi al la teamo. Kaj rokgrimpado tute ŝanĝis mian vivon, ĝi igis min firmvola kaj gajhumura,” diris la 29-jara Liu Yan, kolemino de Dai Yun en metroo-kompanio. Nun, krom ŝia okupo, aferoj de la teamo estas plej gravaj por ŝi.

En septembro de 1996, la teamo sukcesis grimpi sur Taibai-

neĝmonton en nordokcidenta Ĉinio. En tiu ĉi junio, 12 membroj de la teamo atingis Yuzhu-montpinton 6 178 m super la marnivelo, interalie du knabinoj el ili estis nur 19-jaraj.

Montrante la fotojn faritajn tiun tagon, kiam ili grimpis sur Yuzhu-montpinton, Liu Yan ekŝatiĝis: “Estis la 16-a de junio. Samtempe ankaŭ du alilandaj montgrimparoj grupoj grimpis sur la montpinton Yuzhu. Poste malboniĝis la vetero, neĝis kaj ventegis. Ŝajne neebliis atingi la pinton. La du alilandaj grupoj sinsekve retiriĝis. Dai Yun ordonis al la teamanoj iri returne al la stabejo. Ili ripozis unu nokton. La sekvantan tagon reboniĝis la vetero. Ok el la dek du teamanoj unuspire grimpis sur la pinton. Tion ni ŝuldas al la ĝusta komando de Dai Yun!”

“Sed bedaŭrinde Liu Yan kaj mi ne atingis la montpinton,” Dai Yun diris, “ĉar ni devis resti en la stabejo por kontaktiĝi kun homoj sur la monto kaj ĉe la montpiedo.” Kiel estro, li devis antaŭ ĉio garantii plenumon de la montgrimpa plano kaj sekurecon de la tuta teamo. “Kia fiero, ke ok mem-

broj kune atingis la montpinton! Mi certe havos ŝancon.”

Liu Yan kapjesis.

Por la morgaŭo de la Junulara Rokgrimpa Teamo estas ankaŭ ĉagrenoj:

Unue, manko de monrimedoj. La teamanoj devas mem pagi por ĉiuj aktivadoj. Pro manko de monrimedoj malfacilas ŝanĝo de ekipaĵoj kaj luo de trejnejo.

Due, malmulteco de trejnejoj. Dai Yun kaj liaj kamaradoj semajnofine povas iri, krom antaŭurbon de Pekino, nur la menciitan Montgrimpan Trejnejon aŭ iun rokgrimpan klubon en la urbo.

Trie, manko de ŝanco kontaktiĝi kun alilandaj rokgrimpantoj. En la somerkomenco de tiu ĉi jaro la Ĉina Montgrimpa Asocio invitis francan rokgrimpan trejniston Alan okazigi unu-semajnan kurson por trejnistoj. Instruite de s-ro Alan, Dai Yun profunde sentis grandan distancon tiuflanke inter la postiĝinta Ĉinio kaj la avangarda Francio. Pro tio Dai Yun foje-foje veis: “Jaron post jaro ni esploris la arton de rokgrimpado nur per ni mem. Se ni havus ŝancon lerni sperton kaj teknikon de alilandanoj, ni multe rikoltus.” ■

# Diversaj farunaĵoj de Shanxi-anoj

**L**a provinco Shanxi (Ŝanŝji) en la meza baseno de la Flava Rivero abundas je tritiko. Tial la tritikaj farunaĵoj estas ĉefa manĝaĵo por la tieaj loĝantoj. Laŭ malsamaj manieroj de preparado oni dividas ilin en tri specojn, t.e. kukojn, vermiĉelojn kaj mantoojn (diversformaj vaporumitaj farunaĵoj). Tie preskaŭ ĉiuj dommastrinoj lertas en preparado de kelkaj kaj eĉ kelkdek specoj da farunaĵoj, kiaj tranĉitaj kaj mantiritaj vermiĉeloj. Ankaŭ iuj viroj de la provinco estas lertaj en tio.

Estas ĝuo rigardi, kiel ili faras tranĉitajn vermiĉelojn. Tenante en la mano grandan farunan paston, ili rapide tranĉas ĝin per malpeza kurba tranĉilo. Farunaj pecoj maldikaj falas unu post alia en poton kun bolanta akvo. Momenton poste, kiam la vermiĉeloj estas bone kuiritaj, ili per kribrieto elakvigas ilin kaj en granda bovlo miksas ilin kun buljono kaj legompecoj. La tiel preparitaj vermiĉeloj estas apetitivekaj. Ili estas ŝatataj ne nur de Shanxi-anoj, sed ankaŭ de alilokaj ĉinoj.

Pri manĝado de farunaĵoj la Shanxi-anoj havas sian propran moron, ekz. en la nupta tago la novedzino nepre devas manĝi ĝjaŭzi-ojn (ĉina farunaĵo farĉita), antaŭ ol forlasi la domon de siaj gepatroj, kaj vermiĉelojn, atinginte la domon de sia edzo. Tiu moro evoluis poste en pli vastan skalon: Antaŭ adiaŭo de gastoj oni regalas ilin per ĝjaŭzi-oj kaj por bonvenigi gastojn — per vermiĉeloj. La deveno de la moro estas jene: Antaŭe pro malriĉeco oni ne manĝis ĝjaŭzi-ojn en ordinaraj tagoj kaj ĝuis ilin nur en la festaj. Pro tio oni portas la ideon de ĝoja festado. Plie en la ĉina lingvo la prononco de ĝjaŭzi-o similas al tiu de nasko de filo, tial per la manĝaĵo oni deziras, ke la novedzino kiel eble plej baldaŭ nasku filon. Ĉar vermiĉeloj estas longaj, ili do simbolas restigon de gasto por longa tempo kaj eternan kunvivadon de la geedzoj.

En Shanxi la plej belaj kaj delikataj farunaĵoj

estas tiuj por kulto kaj solenado. Literaturistoj nomas ilin faruna modlaĵo.

La modlitaj farunaĵoj havas malsamajn formojn, kiaj tiuj de tigro, karmo, persiko kaj lotusfloro. La plej granda pezas pli ol 5 kg. kaj la plej malgranda nur dekojn da gramoj. La farunaĵoj por kultado kaj tiuj por donaco estas malsamaj. Ekz., ĉe la fianĉiĝo de sia estonta bofilo la maljunulino donacas al li tigroforman farunaĵon, kiu simbolas ŝian deziron, ke li estu forta kiel tigro. Kaj la maljunulino donacas al sia estonta bofilino farunaĵon

en formo de karmo kun farunaj lotusfloroj sur la dorso, kiu aludas ŝian deziron, ke la bofilino estu sagaca kaj lerta kiel karmo kaj pura kiel lotusfloro. Ĉe unu-monatiĝo de bebo, lia avino donacas al li kolĉenoformajn farunaĵojn kun la deziro, ke encirkligita, li evitu ĉian danĝeron kaj sane kresku. Gratulante maljunulojn pro datreveno de ilia naskiĝo, oni devas donaci al ili persikoforman farunaĵon aŭ pladoforman farunaĵon kun jujuboj sur ĝi, kio aludas al ili santon kaj longan vivon.



Farado de tranĉitaj vermiĉeloj

La Printempa Festo estas la plej grava por la ĉina popolo. Shanxi-anoj kutimas kulti Kuirejan Dion antaŭ la Printempa Festo per montoforma farunaĵo kun jujuboj, por ke la dio benu ilin en la venonta jaro. La 4-an aŭ 5-an de aprilo ili faras diverskolorajn hirundojn el faruna pasto, kunligas ilin per salikaj vergoj kaj pendigas ilin en siaj ĉambroj. Tiuj hirundoj alportas printempan etoson al la domoj, kie la vintra malvarmo ankoraŭ ne cedis al la bela printempo.

En kamparo de Shanxi oni juĝas la lertecon de junaj virinoj laŭ kvalito kaj formo de la de ili faritaj farunaĵoj. Ĝenerale oni faras ilin per siaj propraj manoj, kaj iafoje ankaŭ per apartaj instrumentoj, kiaj kombilo kaj tranĉilo. Oni faras okulojn de bestoj el faboj, buŝon el jujubo kaj bildojn sur la farunaĵoj ĵus vaporumitaj. Jen estas pretaj viglaj tigroj, karmoj, persikoj kaj aliaj. ■

# Fenestro por koni Ĉinion

**Pekina Revuo**, semajna gazeto, fondita en 1958 kaj eldonata en la lingvoj angla, franca, hispana, germana kaj japana. Ĝi raportas pri ĉinaj ekonomio, politiko, scienco, kulturo, sporto ktp., aperigas gravajn dokumentojn de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina registaro kaj gravajn leĝojn kaj prezentas vidpunktojn de Ĉinio pri gravaj internaciaj aferoj.

**Ĉinio Hodiaŭ**, monata gazeto, fondita en 1952 kaj eldonata en la lingvoj ĉina, angla, franca, hispana, araba kaj germana. Ĝi konigas ĉinajn politikon, historion, ekonomion, kulturon, arton, edukadon, sporton, sciencon, turismon kaj geografion de Ĉinio kaj la vivon de ĝiaj nacimalplimultoj.

**Ĉinio**, monata gazeto, grandformata, fotoabunda kaj eldonata en la lingvoj ĉina, tibeta, angla, franca, japana, germana, araba, rusa, hindia, hispana, svahila, itala, urdua kaj taja. Ĝi raportas pri la vivo de la ĉina popolo.

**Ĉinio kaj Afriko**, monata gazeto. Ĝi prezentas ne nur konstruadon de Ĉinio, sed ankaŭ evoluadon de Afriko kaj amikecon inter Ĉinio kaj Afriko. Ĝi aperas en la lingvoj angla kaj franca.

**Ĉina Literaturo**, trimonata gazeto. Ĝi havas anglan kaj francan versiojn de nuntempaj kaj an-

tikvaj eminentaj literaturaĵoj de Ĉinio. Ĝiaj rubrikoj, kiaj novelo, poezio, prozo, dramo, folkloro, kritiko, biografio de verkistoj kaj artistoj, recenzo, galerio kaj kultura aktivado, prezentas sukcesojn kaj la nunan staton de ĉinaj literaturo kaj arto.

**Popola Ĉinio**, monata gazeto eldonata ĉefe por japanaj legantoj. Ĝi raportas, krom la disvolviĝo de Ĉinio, ankaŭ ĝiajn historion, pejzaĝon kaj arkeologion, morojn kaj vivon de ĝia popolo.

La supre menciitaj gazetoj estas eldonataj de la establoj sub la Ĉina Internacia Eldona Grupo kaj distribuataj de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (ILKKĈ). La 1998-abonvarta periodo daŭras de 10.01.97 ĝis 02.28.98. Se vi volus aboni ilin, bv. sendi la plenigitajn abonilojn kun via abonpago al ILKKĈ aŭ nia peranto en via lando. Detalaĵoj haveblas ĉe:

**Internacia Libro-Komerca  
Kompanio  
de Ĉinio,  
Chengongzhuang Xilu 35, P. O.  
Kesto  
399, 100044  
Beijing, Ĉinio.  
Fakso: +86-10-68412023  
Retpoŝto: cibtc@www.cibtc.  
co.cn**



## ABONKOTIZO DE *EL POPOLA ĈINIO* POR 1998

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Pagenda sumo
Argentino	USD	12	6	18
Aŭstralio	AUD	19	24	43
Aŭstrio	ATS	184	230	414
Belgio	BEF	550	660	1210
Brazilo	USD	12	6	18
Bulgraio	USD	10	6	16
Britio	GBP	10	12	22
Ĉeĥio	USD	10	6	16
Danlando	DKK	94	122	216
Estonio	USD	10	6	16
Finnlando	FIM	74	94	168
Francio	FRF	84	108	192
Germanio	DEM	24	32	56
Greklando	USD	14	18	32
Hispanio	USD	14	18	32
Hungario	USD	10	6	16
Irano	USD	10	6	16
Irlando	GBP	10	12	22
Islando	NLG	28	35	63
Israelo	USD	14	18	32
Italio	ITL	24000	30800	54800
Japanio	JPY	1700	2160	3860
Jugoslavio	USD	10	6	16
Kanado	CAD	20	26	46
Korea Resp.	USD	12	6	18
Kroatio	USD	10	6	16
Latvio	USD	10	6	16
Litovio	USD	10	6	16
Luksemburgio	BEF	550	660	1210
Nederlando	NLG	28	35	63
Norvegio	NOK	106	134	240
Nov-Zelando	NLG	28	35	63
Pollando	USD	10	6	16
Portugaliao	USD	14	18	32
Rusio	USD	10	6	16
Slovakio	USD	10	6	16
Slovenio	USD	10	6	16
Sud-Afriko	USD	14	18	32
Svedio	SEK	116	146	262
Svislando	CHF	20	27	47
Ukrainio	USD	10	6	16
Usono	USD	14	18	32
Vjetnamio	USD	10	6	16

1. Ĉiuj evoluintaj landoj ne jam menciitaj supre laŭ Usono aŭ Nederlando.
2. Hongkong, Meksikio, Singapuro kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko laŭ Brazilo.
3. Ĉiuj landoj en Azio, Afriko, Orienta Eŭropo kaj la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj ne jam menciitaj supre laŭ Bulgario.

**Por aera sendo bonvolu nepre aldoni 18 USD aŭ egalan valoron al la agenda sumo.**

# Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero



La Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero konsistas el Qutangxia, Wuxia kaj Xilingxia, kun totala longeco de 193 kilometroj. Ambaŭflanke de la torenta rivero estas mirindaj montoj kaj multaj historiaj restaĵoj. La Tri Gorĝoj estas turisma vidindaĵo.

La poŝtmarkoserio havas 6 pecojn, emisiitajn de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko en 1994.





Lacerto

de STANKOVIĆ  
P. NEBOJŠA  
(Jugoslavio)



Ora aŭtuno

de SŁAWOMIR  
SZYMALA  
(Pollando)

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九七年第十二期  
(本刊代号: 二—九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2

